

EL POPOLA ĈINIO

中國報道 1979 3



Ĉongking




La monta urbo





Sosea ponto super Gialing-rivero

Ĉaŭtianmen en nokto





La Revolucia Memoriga
Domo en Hongjan-vilaĝo





En magazzino



En restoracio



Unu strato




La Norda Termofonta Parko

Ĝeng Hiaŭjing

-direktantino de orkestro



Ĝeng Hiaŭjing



Post noktiĝo la Pekina Muzika Halo dronis en bela melodio. Eleganta direktantino estis direktanta orkestron ludantan fragmentojn el la opero "Karmen". La melodio sonis jen kun forta emocio, jen en lirika etoso kaj finiĝis per ŝia abrupta movo. La ludo vekis ĉe la aŭskultantoj longan mankrakadon.


Si estas neniu alia ol Ĝeng Hiaŭjing.

Si diplomitiĝis el la Virina Ginling-universitato de Nankino. Poste ŝi partoprenis en revolucia arta rondo. Post la Liberigo, ŝi estis sendita al la direkta fakultato de la Centra Konservatorio. Poste ŝi studis eksterlande. Reveninte al la patrolando ŝi fariĝis direktantino de la Centra Opera Teatro kaj famiĝis post sukcesa direktado de grandaj orkestraj komponaĵoj de fame konataj komponistoj Betoveno, Ĉajkovskij kaj aliaj. Post kiam ŝi akiris brilan sukceson en direktado de la opero "Aigul", ŝi estas rigardata de la muzikaj rondoj kiel eminenta direktantino.

Nun, la de ŝi direktata orkestro de la Ĉina Opera Teatro ludis multajn novajn komponaĵojn, el kiuj la plej laŭdata estas komponaĵo en la baledo "Knabino kun Alu-metoj", adaptaĵo de fabelo de Andersen.



Lastatempe Geng Hiaŭjing akiris grandan sukceson en direktado de opera koncerto en la Pekina Muzika Halo.



Dimanĉe ŝi diligente studas komponaĵon en sia hejmo.



Si donas lekcio en la Centra Konservatorio.



Geng Hiaŭjing
kun muzikistoj



Si helpas sian filinon en ekzerco.

EL POPOLA ĈINIO

中國報道

1979

N-ro 3

(246)

Monata gazeto eldonata de ĈINA ESPERANTO-LIGO

P.O. Kesto 77, Pekino, Ĉinio

Ĝenerala distribuanto: Guozi Shudian

P.O. Kesto 313, Pekino, Ĉinio

SUR LA KOVRILO:

P. 1. Paraŝutado

P. 4. Ardeoj

(Ĉinstila pentraĵo
de VANG ĜOŬ)



Enhavo

Granda turniĝo	2
La vigleplena Nankina Universitato.	4
La popola deziro	11
Granda salto de nia produktado de ŝtalo	14
Verda Majo en Ĉinio	16
Disvolvo de socialisma demokratio	20
ESP-NOVAĴOJ: Esperanta aktivado en Ĉengdu	22
Jadoskulptisto Vang Ŝusen	23
Vizito al la monturbo Ĉongking	25
Teatra arto por infanoj	29
Mia familia vivo	31
Nova revuo de la azia sporto	33
AMIKECO: Profunda amikeco	36
Fine realiĝis la espero	38
Usona sekvojo en Ĉinio	39
EN PEKINO: Liuliĉang — antikva kultura strato	40
EI ĈINA MODERNA HISTORIO: Antaŭ alveno de nova periodo de la ĉina revolucio	42
KALEJDOSKOPO	45
KURANTAJ AFEROJ	46
Korespondi deziras	48



Granda Turniĝo

de NIA RAPORTISTO



Granda turniĝo aperis en Ĉinio.

De la jaro 1979, la gravita punkto de ĉiuj laboroj de nia lando estas turnita al la socialisma modernigo. Tio havas grandan signifon por modernigi industrion, agrikulturon, nacidefendon kaj sciencon kaj teknikon de nia lando.

La decido estis farita en la Tria Plena Sesio de la Dekunua Centra Komitato de la Komunista Partio de Ĉinio okazigita en Pekino de la 18-a ĝis la 22-a de decembro de la lasta jaro. Antaŭ la sesio okazis laborkunveno de la Centra Komitato de la Partio, kiu faris plenan preparon por la sesio.

La turno de gravita punkto de ĉiuj laboroj de la tuta lando celas multe altigi produktajn fortojn, ŝanĝi malriĉan kaj postĝintan fizionomion de nia lando, plibonigi popolan vivon, plifortigi nacidefendon kaj multe kontribui por defendi pacon kaj progresajn aferojn de la mondo. Ĝi spegulis historian postulon kaj popolan deziron.

Por plenumi la grandan taskon de la socialisma modernigo, estas tre necese teni la socion en politika stabileco kaj agi laŭ objektiva ekonomia leĝo. Nun, jam fundamente finiĝis venke la amasa movado de malkovro kaj kritiko al Lin Biaŭ kaj la "kvarpersona bando" en la tuta lando

kaj formiĝis politika situacio de stabileco kaj solidareco. En la pasintaj pli ol du jaroj oni restarigis kaj persiste praktikis diversajn efikajn ekonomiajn politikojn. Laŭ la novaj historiaj kondiĉoj kaj praktika sperto oni alprenis serion da novaj ekonomiaj rimedoj, komencis seriozan reformadon al ekonomia administra sistemo kaj administraj metodoj, aktive disvolvis ekonomian kunlaboron kun diversaj landoj de la mondo sur la bazo de sinapogo sur propraj fortoj kaj laŭeble uzis avangardajn teknikojn kaj ekipaĵojn de la mondo. Tio kreis favorajn kondiĉojn por altrapida konstruado de la socialisma moderna Ĉinio.

Ĉar agrikulturo estas bazo de la nacia ekonomio, nuntempe la tuta lando koncentras ĉefan forton por kiel eble plej rapide disvolvi ĝin. En la lastaj jaroj agrikulturo estis serioze subfosita. Por garantii rapidan disvolvon de la tuta nacia ekonomio kaj senĉese altigi vivnivelon de la tuta popolo oni devas rapide restarigi kaj disvolvi agrikulturan produkton kaj efektiviigi paŝo post paŝo agrikulturan modernigon.

Frue en la komenca periodo de la fondiĝo de la nova Ĉinio, Kamarado Maŭ Zedong plurfoje montris, ke la labora centro de nia lando devas esti turnita al ekonomia konstruado kaj teknika revolucio. En 1958, li diris: "Ni nepre devas streĉi energion por lerni kaj plenumi nian gran-

dan teknikan revolucion komisiitan de la historio.” Li daŭrigis: “En la pasinteco ni lerte faris militon kaj agraran reformon, tamen nun tio ne sufiĉas por ni, ni devas lerni novan scion, vere posedi profesion scion kaj sciencojn kaj teknikojn, alie ni ne povas fari ĝustan gvidadon de produkto.” Por realigi la turnon, la tuta Partio kaj la tuta popolo de Ĉinio, sub la gvido de Prezidanto Maŭ kaj Ĉefministro Ĝoŭ, faris multajn laborojn kaj akiris grandajn atingojn. Sed, en la pasintaj pli ol 20 jaroj, tiu granda turniĝo ne efektiviĝis.


Kial? La kaŭzoj estas multaj: Internacie, komunistaj partioj de iuj landoj fariĝis reviziismaj, kaj nia lando devis direkti nian grandan atenton al batalo kontraŭ kaj prevento de reviziismo, enlande pro eraroj en niaj laboroj, precipe pro serioza subfosado de Lin Biaŭ kaj la “kvarpersona bando” en la pasintaj dekelkaj jaroj, la ekonomio kaj produktaj fortoj de nia lando suferis plagon.

En oktobro de 1976, nia lando frakasis la kontraŭrevolucion puĉan intrigon de la “kvarpersona bando” kaj rompis ĝian bandan sistemon. Dank’ al la streĉa laboro de pli ol du jaroj, situacio de stabileco kaj solidareco aperis en la tuta lando.

En 1978, industria produkto de nia lando havis relative grandan kreskon. La jaraj produk-

taj taskoj de ŝtalo, karbo, petrolo kaj aliaj estis antaŭdate plenumitaj. Kvankam iuj provincoj suferis seriozan sekegecon, tamen produktokvanto de greno, kotono kaj ole- kaj sukerdonaj plantaĵoj de nia lando pligrandiĝis kompare kun tiu de 1977, kaj greno pliproduktiĝis je 10,000,000 tunoj. Internacie nia lando gajnis novan gravan sukceson en disvolvo de internacia kontraŭhegemonia unuecfronto kaj amikeca rilato kun diversaj landoj de la mondo. En 1978 niaj gvidantoj faris viziton al Koreio, Rumanio, Jugoslavio, Kamboĝo, Irano, Birmo, Nepalo, la Filipinoj, Bengaldeŝo, Japanio, Tajlando, Malajzio, Singaporo k.a.. Subskribiĝis la Paca kaj Amikeca Traktato inter Ĉinio kaj Japanio kaj oficiale stariĝis diplomatia rilato inter Ĉinio kaj Usono. Prezidanto Hua Guofeng diris en nomo de la Politika Buroo de CK de KPC en la plena sesio de CK, ke konforme al la bonega situacio en- kaj eksterlanda, ni devas meti la gravitan punkton de diversaj laboroj de la tuta lando sur la socialisman modernigon.

Por realigi la kvar modernigojn necesas multe altigi produktajn fortojn, ŝanĝi produktan rilaton, superstrukturon, administrajn formojn kaj pensmanieron, kiuj ne konformas al disvolviĝo de produktaj fortoj. Tial la granda turniĝo estas vasta profunda revolucio kaj puŝas nian popolon al plenumo de grandioza afero neniam farita de niaj antaŭuloj.



La Vigle plena


Nankina Universitato

de NIAJ RAPORTISTOJ

EN novembro, la serena kaj agrabla sezono de suda Ĉinio, ni vizitis la Nankinan Universitaton sude de Jangzi-rivero.

Ĝi estas unu el la gravaj altaj lernejoj de nia lando. En la vasta kaj kvietaj lernejkorto pompe floras orflavaj krizantemoj kaj violaj kokkrestaj floroj (*Celosia argentea var cristata*), kaj en verdaĵoj elrigardas instruaj domegoj. Ni intervjuis vicestron de instruaj aferoj de la universitato Vang Dezi. Li diris al ni, ke la universitato fondiĝis en 1902. Antaŭe ĝi estis la Centra Universitato kaj Ginling-universitato funkciigataj respektive de la kuomintanga registaro kaj de kristana misiejo. Tiam nur gefiloj de malmultaj riĉuloj povis viziti ĝin. Post la Liberiĝo ĝi malfermis sian pordon al gefiloj de la vasta laboranta popolo. En la pasintaj preskaŭ 30 jaroj ĝi jam disvolviĝis en universitaton en kiu funkcias 44 fakoj de 14 fakultatoj de la ĉina lingvo, historio, filozofio, ekonomiko, fremdaj lingvoj, matematiko, scienco de komputero, astronomio, fiziko, kemio, biologio, geologio, geografio kaj meteorologio. En ĝi laboras pli ol 3,000 instruistoj kaj oficistoj, inter kiuj estas famaj profesoroj kaj specialistoj kaj ankaŭ mezaĝaj kaj junaj instruistoj elkulturitaj post la Liberiĝo. La nombro de ĝiaj diplomitoj en la pasintaj 30 jaroj atingis pli ol 20,000, t. e. 5-oblo de la totala nombro de ĝiaj diplomitoj en 46 jaroj antaŭ la Liberiĝo. Ĝis 1967 ĝia geologia fakultato elkulturis 2,000 geologojn kiuj nun laboras en la tuta lando. Triono de la membroj de la petrol-prospektora brigado de la Ŝtata Geologia Ĝenerala Buroo estas diplomitoj de tiu fakultato.

Vicestro Vang Dezi kondukis nin al la kabineto de rektoro Kuang Jaming. Ĝi estas ordinara ĉambro tre simple meblita. La maljuna rektoro varme akceptis nin. Kiam ni enmanigis al li ekzempleron de "El Popola Ĉinio", li flue legis ĝian titolon kaj diris, ke en sia juneco li lernis Esperanton en malliberejo de la malamikoj. Li foliumis kaj laŭdis la revuon. Kaj ni sentis entio apartan intimecon. Ni diris, ke multaj el niaj legantoj sin okupas pri edukado kaj sciencoj, kaj ili tre interesiĝas pri la ĉina eduko. Informiĝinte, ke bone funkcias la Nankina Universitato, ni decidis raporti ĝin. La rektoro diris modeste: "Kompare kun la laboro de aliaj avangardaj fra-



taj lernejoj, la nia havas ankoraŭ nemalmultajn mankojn. Vi jam scias, ke la 'kvarpersona bando' multe damaĝis la edukon, kaj ankaŭ nia lernejo ne povis eskapi de la plago. Nun multaj laboroj ĉe ni estas en reordigado. La partia komitato de la lernejo elmetis jenan sloganon: ordigo en unu jaro, ŝanĝo de fizionomio en tri jaroj kaj plenampleksa impeto en 8 jaroj. Nun ĉiuj en nia lernejo klopodas por efektivigi tiun celon." Adiaŭante, la maljuna rektoro aparte atentigis la vicestron, ke li faru ĉion eblan por faciligi nian intervjuon.

DILIGENTA STUDADO

Post reformado al la varba sistemo en 1977, ĉiuj novaj studentoj estas elektitaj per rigora ekzamenado. En la universitato ili ĉiuj diligente studas. Ĉiumatene, apenaŭ krepuskiĝas, iuj studentoj jam komencas laŭtlege fremdlingvan lecionon sub eksterdomaj lampoj, kaj post la signalo de enlitiĝo, estas ankoraŭ homoj, kiuj legas en koridoroj.

Jang Kjunjing estas helpa instruistino de la unua klaso de la filozofia fakultato. En 1974 ŝi estis rekomendita al la universitato, kaj diplomitiĝis en 1977. Ŝi diris al ni, ke la novaj studentoj havas bonan fundamenton kaj grandan entuzias-



Rektoro Kuang Jaming (meze)

mon en studado, tute malsame ol tiuj antaŭ kelkaj jaroj.

Iun tagon ni venis en la klasĉambron de la filozofia fakultato kaj vidis, ke du instruistoj interparolas kun studento. Post pridemando ni sciis, ke tie iris buŝa ekzameno al la studento varbita en 1977. La ekzamenato flue respondis ĉiujn demandojn kaj pro tio li gajnis plenan noton 5. Li nomiĝas Zoŭ Jing kaj havas 16 jarojn. Li venis de kamparo de Giangsu-provinco. Li

La Nankina Universitato



diris, ke filozofio estas resumo de naturaj kaj sociaj sciencoj. Krom studo de sociaj sciencoj, ili lernas ankaŭ matematikon, fizikon, biologion, astronomion, geosciencojn kaj fremdan lingvon, kaj en la dua klaso logikon kaj naturan dialektikon. Ĉar la lernoobjektoj estas riĉaj, la instruado estas bona kun vigla diskutado de la studentoj, li havas grandan intereson pri la studo de filozofio. Laŭ la statistiko de la fakultata oficejo, el la 78 ekzamenitoj 32 ricevis noton 5, 38 noton 4 kaj 8 noton 3. La instruistoj kontente diris, ke tia sukceso estis nevidita dum multaj jaroj. Por konformi al la nova nivelo de la studentoj, ili decidis ĉiamaniere klopodi por bone doni lekciojn.

Ni intervjuis studenton Tong Hing, kiu ekvizitis la lernejon en 1977. En 1967 li diplomitiĝis en mezlernejo kun elstara sukceso kaj aspiris viziti altan lernejon. Tamen tiam en la socio furoris la absurdaĵo “ju pli klera, des pli reakcia”, kaj iuj talentaj intelektuloj estis atakitaj kiel “reakciaj akademiaj aŭtoritatuloj” kaj iuj inĝenieroj, teknikistoj kaj diplomitoj de altaj lernejoj estis senditaj al fabrikoj kaj kamparo, kie ili ne povis uzi siajn sciojn. Vidinte tion, li malesperiĝis. En 1972 iuj altaj lernejoj rekomencis varbi novajn studentojn per rekomendo. Tong Hing propraokule vidis multajn ne-

raciajn fenomenojn en tiu laboro kaj tre indigniĝis de tio. De tiam li ne plu volis viziti altan lernejon. En 1977 oni komencis elekti studentojn tra ekzamenoj kaj eĉ permesis abiturientojn de 1966-1968 partopreni en enira ekzameno en aĝo de 30 jaroj, kio havigis al Tong Hing ŝancon. Li sukcese trapasis la ekzamenon kaj ekvizitis filozofian fakultaton de la Nankina Universitato. Li ĝoje diris al ni: “En nia klaso estas kelkaj studentoj samaĝaj kun mi. Ni tre domaĝas tiun bonan ŝancon de lernado. En la pasintaj kelkaj jaroj mi legis nombron da verkoj de marksismo-leninismo en postlaboraj horoj kaj ju pli multe mi studis, des pli klare mi sentis, ke la teorio de la ‘kvarpersona bando’ havas nenian similecon al marksismo-leninismo. Mi vizitas filozofian fakultaton ja por sisteme studi marksismon-leninismojn kaj fariĝi marksisma teoria batalanto.”

En la matematika fakultato ĝia respondeculo diris al ni, ke en 1978 ĝi varbis 114 novajn studentojn ĉiujn devenantajn de laborula familio. Inter ili 98 estas membroj de la Komunisma Junulara Ligo, 56 havas aĝon de 15-17 jaroj kaj 49 ricevis pli ol 400 poentojn en la ekzamenoj pri 5 studobjektoj. Ili estas scivolemaj kaj energioplenaj. Ili ne kontentas pri la donitaj lecionoj kaj ĉiamaniere klopodas por akiri referencajn



Senehiga ĉambro de la fizika fakultato

librojn por legado. Iuj studentoj 1977-jaraj solvis pli ol 2,000 problemojn en "Ekzercaro laŭ Matematika Analizo" de Demidoviĉ. Dong Ping-ping estas studento de la kemia fakultato. Li tre ŝatas matematikon kaj pro tio la universitato permesis lin, post trapaso de ekzameno, studi en dua klaso de la matematika fakultato. Tie li lernis nur unu jaron kaj duonon kaj diplomitiĝis en sia aĝo de 20 jaroj. Ĉu li havas neordinaran talenton? Ne tute. Lia diligenteco en la lernado estas kortuŝa. Li devigis sin parkeri vortojn de fremda lingvo dum manĝado kaj irado kaj ne rigardis filmojn, nek teatraĵojn. Foje lia patro venis al Nankino pro ofica misio kaj volis vidi lin. Parolinte nur kelkajn vortojn, li haste adiaŭis la patron. Li rigardis ĉiun sekundon tre kara. Ĝuste tia diligenteco ebligis al li gajni bonegan sukceson en la lernado. Post diplomitiĝo li laboras en la universitato kiel asistanto, tamen li studas diligente kiel antaŭe, kaj nun li sin preparas al ekzamenado por fariĝi esplora studento.

En 1977 la Nankina Universitato komencis akcepti fremdlandajn studentojn. En 1978 tie jam lernis 50 tiaj studentoj el Britio, Japanio, Francio, Nederlando, Okcidenta Germanio, Svisio, Svedio, Italio, Jugoslavio, Usono, Kanado, Novzelando, Aŭstralio k. a. Ili studas la ĉinan lingvon kaj la ĉinan historion. Krom siaj propraj lernoobjektoj ili povas aŭskulti aliajn lekcionojn laŭplaĉe. Por havigi al ili pli multajn ŝancojn por koni la ĉinan socion, la lernejo ofte aranĝas por ili vizitadon de fabrikoj kaj kamparo. Iu kamarado, kiu laboras en la sekcio pri fremdlandaj studentoj, diris, ke estonte stariĝos por fremdlandaj studentoj fakoj de la ĉina filozofia historio, ekonomiko, arkeologio, literaturo, matematika logiko, astronomio kaj meteorologio, kaj la nombro de fremdlandaj studentoj atingos 800 en 1985. Li diris al ni ankaŭ, ke komence de 1979 la universitato kaj la usona Wisconsin-universitato sendos unu al la alia eruditojn kaj studentojn kaj kunlaboros en scienca esplorado. Tiu informo multe entuziasmigis la instruistojn kaj studentojn de la universitato. Ili esperas, ke ilia nivelo de instruado kaj scienca esplorado senĉese leviĝos en sciencaj interŝanĝoj kun fremdaj landoj.



La astronomia fakultato

FREŜA DEMOKRATIA ATMOSFERO

Dum la vizitado al la Nankina Universitato nin profunde impresis ĝia vigla akademia aktivado.

La 20-a de majo estas festotago de la Nankina Universitato. Ĉiujare en tiu tago okazas diversaj simpozioj en la universitato. La simpozio en 1978 estis la plej granda en la historio de la lernejo, en kiu prezentigis 631 disertacioj, t. e. duoblo de tiuj de 1977. Kaj la ĉeestantaro de la simpozio el diversaj lokoj nombris 20,000 personojn.

Tia demokratia diskutado pri sciencaj temoj ne nur liberigis la pensojn de la instruistoj kaj studentoj, sed ankaŭ akcelis la sciencan esplorado de la lernejo. En la filozofia fakultato ni intervjuis vicdekanon Hu Fuming. Li publikigis en ĵurnaloj influhavajn artikolojn, en kiuj liaj ĉefaj tezoj estas: Nun, kvankam la "kvarpersona bando" kaj ĝia sistemo frakasiĝis, tamen ĝia spirita kateno ankoraŭ ne plene rompiĝis. Ĉu en teorio aŭ en praktikaj laboroj ĝi difinis ne-

malmultajn “malpermesitajn lokojn”, pri kiuj oni devas kuraĝe tuŝi kaj distingi veron de malvero. La sciencoj ne havas malpermesitan lokon. En loko asertita kiel absolute “malpermesita” ne estas scienco, nek vera marksismo-leninismo kaj maŭzedongpenso, sed nur obskurantismo, ideismo kaj kultura diktaturo. Li opinias, ke limigi kaj pritondi senlime riĉan kaj rapide disvolviĝantan revolucion praktikon per formuloj de marksismo-leninismo kaj maŭzedongpenso estas erara sinteno. Liaj artikoloj ludas aktivan rolon por liberigi penson. Li diris al ni, ke lia sukceso en verko de tiuj artikoloj estas neapartigebla de la demokratia kaj libera atmosfero kaj subteno de la gvidantoj de la Nankina Universitato.

Samopinias pri tio Li Hining, vicsekretario de la Komitato de la Komunisma Junulara Ligo de la Nankina Universitato. La lernejo ĵus okazigis kunvenon por korekti eraran verdikton pri li. Li estis unu el la gvidantoj de la “Nankina Evento” de marto de 1976. Tiam li kun instruistoj kaj studentoj de la lernejo sub sia gvido skribis sur stratoj kaj vagonaroj sloganojn kontraŭ la “kvarpersona bando”, kiu ne permesis la amasojn funebri pri Ĉefministro Ĝou Enlaj, kaj pro tio li estis arestita. Li liberiĝis nur post frakaso de la bando. Lastatempe li estis elektita kiel membro de la Centra Komitato de la Komunisma Junulara Ligo. Li diris al ni ke li kuraĝis oponi kontraŭ la bando nur pro tio, ke li estis influita de la demokratia kaj libera atmosfero de la Nankina Universitato kaj subtenita de la vasta amaso de ĝiaj instruistoj kaj studentoj.

En la historia fakultato oni faras varman diskutadon ne nur pri iuj problemoj de la ĉina historio, sed ankaŭ pri grandaj aferoj kaj personoj de fremdlandaj historioj. Foje Huang Hongĝaŭ de la grupo de la monda historio laŭtlegis sian disertacion “Pri Taksado de Napoleono Bonaparte”. En ĝi li analizis la epokon de Napoleono, montris la kontraŭfeŭdisman karakteron de lia reĝimo kaj lian pozitivan rolon en la franca historio, kaj samtempe ankaŭ emfazis la reakciecon de lia burĝa reĝimo en likvido de demokratio kaj libereco de la popolo per kruela diktaturo kaj subpremado al la revolucio. La ĉeestantoj de la simpozio varme diskutis pri lia

tezo. Iu diris, ke Huang Hongĝaŭ ĝuste analizis pri Napoleono, sed ne faris detalan takson pri li. Ankaŭ franca studentino Maria partoprenis en la diskutado. Ŝi diris, ke estas nesufiĉe diri, ke Napoleono reprezentis francajn burĝojn. Kiel reprezentanto de la intereso de la grandburĝaro, li ne povis konduki la revolucion profunden, kaj li faris ĉion nur por kvietigi la socion kaj servi al la burĝaro, tial oni ne devas diri, ke li havis duvizaĝecon. Favoroj alportitaj de la Kodo de Napoleono al la kamparanoj estis fundamente alportitaj de la franca revolucio, kaj oni ne devas tro alte taksi lin, alie oni perfidas la francan revolucion.

FRUKTOJ DE SCIENCA ESPLORADO

La nomita universitato atingis certajn sukcesojn en kuna esplorado de pluraj fakoj kaj esplorado de fundamentaj teorioj kaj aplikataj sciencoj, en kio oni ne nur kulturis instruistojn kaj riĉigis la instruon enhavon, sed ankaŭ plenumis la postulon de la ŝtato al ĉefaj altlernejoj funkcii kiel centro ambaŭ de instruado kaj scienca esplorado.

Ni vizitis la geologian fakultaton, en kiu la nombro de la partoprenantoj de la scienca esplorado estas la plej granda. Maljuna profesoro Hju Kekin rakontis al ni kiel la fakultato faras esploron pri granito. En suda Ĉinio sin trovas granda areo da granito, en kiu riĉe konserviĝas tungsteno, stano, berilio, niobimo, tantalio, uranio, torio, oro, molibdeno kaj rarateraj metaloj. En dekoj da jaroj oni elmetis multajn urĝe solvendajn demandojn kiel ekzemple, kial iuj granitaj korpoj entenas mineralon, sed aliaj ne, kial iu entenas oron, sed alia tungstenon? Antaŭ ol koni la internan rilaton inter granito kaj mineraloj, oni ne povis respondi tiujn demandojn. De longa tempo oni opiniis, ke ĉiuj granitoj de suda Ĉinio formiĝis antaŭ cent milionoj da jaroj en unu proceso. Tiu tradicia koncepto katenis la penson de homoj kaj multe malhelpis la prospektadon. En 1957 Profesoro Hju Kekin kun kelkaj junaj instruistoj kaj esploraj studentoj sub sia gvido trovis en suda Gianghi kaledonian graniton. Tiu grava trovo rompis la malnovan koncepton, ke ĉiuj granitoj en suda Ĉinio formi-

ĝis en sama epoko kaj malfermis breĉon por studi granitojn en suda Ĉinio. Sed tiam multaj montris dubon kaj eĉ kontraŭan opinion pri tio. De tiam en multaj tutlandaj simpozioj la problemo pri granitoj en suda Ĉinio fariĝis fokuso de diskutado. Por pli profunde esplori tiun problemon, la fakultato mobilizis 6 instruajn sekciojn. En tiu laboro partoprenis ne nur instruistoj sed ankaŭ esploraj studentoj kaj studentoj de altaj klasoj. Ili sinteze uzis geologion, petrografion, petrokemion, geokemion kaj metodon de izotopa geologia aĝo por fari analizon al pli ol 50 tipaj granitkorpoj de malsamaj epokoj. Krome pli ol cent instruistoj kaj studentoj estis organizitaj por serĉi fosiliojn en malalt-grada metamorfa roko de granita korpo kaj fine trovis fidindajn fosiliojn en tia rokstratumo, en kiu oni ne trovis fosiliojn dum kelkdek jaroj, kaj per tio kontente solvis la disputon pri la epoko de la granita stratumo. Iliaj esploraj rezultoj jam fundamente formis relative kompletan sistemon kaj iuj opinioj estis rekonitaj de la publiko kaj akceptitaj en geologiajn mapojn kaj materialojn oficiale eldonitajn de la ŝtato, ĉio ĉi tio akcelis la disvolviĝon de geologiaj fundamentaj teorioj.

En la esplorado pri granito, la geologia fakultato multe atentis kombini sciencan esplorado kun verkado de disertacioj de esploraj studentoj kaj studentoj de altaj klasoj por diplomitiĝo. En la pasintaj pli ol 20 jaroj, pli ol 1,500 homfojoj partoprenis en tiu laboro kaj la gravaj fruktoj akiritaj en ilia esplorado estis skribitaj en lernolibroj. La fakultato kompilis pli ol 30 specojn de lernolibroj. Lastatempe ili plenumis verkon kun 600,000 ĉinaj ideografiaĵoj, kiu spegulas la plej novajn progresojn en kaj ekster nia lando en la esplorado pri granito kaj elmetis novajn opiniojn pri iuj sciencaj temoj. Ĝi prezentos relative grandan altigon de la scienca nivelo.

Ni pririgardis ankaŭ instruan sekcio de kristala fiziko de la Nankina Universitato. Antaŭe ĝi estis instrua sekcio de metala fiziko. Post sia fondiĝo en la komenco de la kvindekaj jaroj, ĝi elkulturis nemalmultajn tiuspecajn laborantojn, akiris certajn sukcesojn en la esplorado, kaj precipe multe progresis en esplorado pri kristala difekto de malfacile fandeblaj metaloj. Post la granda kultura revolucio, por pli bone disvolvi



Studentoj de la geologia fakultato faras eksperimenton.



Profesoro Hju Kekin kaj gestudentoj en praktikado

ĝian avantaĝon en esplorado de kristalo ĝi estis transformita en instruan sekcion de kristala fiziko. En la lastaj jaroj oni funkciigis tri novajn laboratoriojn, transformis tri laboratoriojn kaj kompilis lernolibrojn de tri fakoj, kiuj fundamente kontentigis la bezonon de la instruado. Ili kondukis fruktojn de sia scienca esplorado en instruajn eksperimentojn kaj lernolibrojn. La de ili kompilita libro "Metala Fiziko" jam estas akceptita de iuj altaj lernejoj kiel lernolibro aŭ referenca libro. Pli ol 80% de la kelkdek disertaĵoj publikigitaj de la instrua sekcio estis skribitaj kun partopreno de studentoj kaj esploraj studentoj.

La sciencaj esploroj de la universitato kiel "Enkonduko kaj utiligo de grandriza herbo", "Esploro de molaĵoj de komputero" kaj "Esploro de Spektroskopio de Mossbauer" ĝuas renomon en la scienca esplorado de la enlandaj altaj lernejoj. En la Tutlanda Scienca Konferenco okazigita antaŭ nelonge 48 el ĝiaj sciencesploraj atingoj ricevis premion.

"NI HAVAS BONAN REKTORON"

Pro kio la universitato havas tian bonan situacion? Ĉu blankharaj profesoroj aŭ novaj studentoj, ĉu instruistoj aŭ oficistoj ĉiuj kun fiero diris: "Ĉar ni havas bonan partian komitaton kaj bonan rektoron Kuang Jaming."

Kuang Jaming estas veterana membro de KPC, kiu aliĝis al ĝi en la jaro 1926, kaj veterana edukisto sin okupanta pri tiu afero kelkdek jarojn. Kiam tiranis la "kvarpersona bando", li suferis kruelan persekutadon dum 12 jaroj. Sed li neniam deprimiĝis pro tio. Post kiam li rekomencis laboron, li decidis bone funkciigi la Nankinan Universitaton per sia tuta energio. Por mobilizi aktivecon de instruistoj, li unue praktikis la politikon rilate al intelektuloj. En la kultura revolucio, 509 homoj de la tuta lernejo estis kulpigitaj kaj metitaj sub ekzamenadon. Dank' al lia klopodo, multaj senkulpaj intelektuloj revenis al sia laborposteno kaj pli ol 80 estis promociitaj kiel profesoroj kaj vicprofesoroj, inter kiuj estas 8 mezaĝaj instruistoj atingintaj eminentajn sukcesojn. Tio forte stimulis la instruistojn. La lernejo ankaŭ fondis kursojn de fremdaj lingvoj,

fundamentaj teorioj kaj novaj teknikoj por junaj kaj mezaĝaj instruistoj. Kuang Jaming ankaŭ kuraĝigis instruistojn bone kompili lernolibrojn. La lernolibroj kaj referencaj libroj kompilitaj de la lernejo atingis 136 specojn, inter kiuj 72 estis eldonitaj en 1978.

Konsiderante praktikan bezonon de la studentoj post la diplomitiĝo. Kuang Jaming proponis fondi devigan lernobjekton de la ĉina lingvo por la novaj studentoj de ĉiuj fakultatoj. Antaŭe la studentoj rajtis diplomitiĝi nur post plenumo de lernado dum difinita nombro da horoj. Por kiel eble plej rapide elkulturi klerajn konstruantojn por la patrolando kaj mobilizi iniciatemon kaj aktivecon de la studentoj, li proponis, ke oni dividu la lernobjektojn en devigajn kaj elektajn, kaj se iu studento atingis la difinitan nombron da poentoj en la lernado, li povas antaŭdate diplomitiĝi. Li proponis ankaŭ, ke profesoroj kaj vicprofesoroj donu lecionojn de fundamentaj teorioj al la studentoj de la unua kaj dua klasoj. Por elfosi latentajn fortojn de instruistoj li pledis por praktiki socialisman principon de distribuado "al ĉiu laŭ lia laboro" kaj difini al instruistoj kaj oficistoj fiksan laborkvanton. . . Liaj pripensitaj proponoj estis akceptitaj de la partia komitato de la Nankina Universitato post diskutado.

Ĉar en la pasintaj pli ol dek jaroj neniu loĝejo estis konstruita por la instruistoj kaj oficistoj en la lernejo, ili loĝas tre malvaste. Foje ni vizitis la hejmon de paro da junaj geinstruistoj de la astronomia fakultato. La geedzoj kun sia dek-jara knabo loĝas en unu ĉambro kaj ni diris, ke estus bone, se ili havus alian ĉambron. La geedzoj diris unuvoĉe: "Ni certe havos post nelonge. Ĉu vi ne vidis la konstruatajn domojn. En ili estos nia nova loĝejo." La mastrino diris ankaŭ, ke eĉ la maljuna rektoro Kuang Jaming loĝas en du malgrandaj ĉambroj. Pri tio ni jam aŭdis multe. Post kiam li rekomencis laboron, la administra fako de la lernejo riparigis por li la antaŭan domon kaj proponis, ke li transloĝiĝu en ĝin. Sed li ĉiam diris, ke li ne rajtas loĝi en tiel vasta domo, dum tiel malvaste loĝas instruistoj kaj oficistoj de la tuta universitato. Konsiderante la karakterizaĵojn de cerba laboro de intelektuloj li atentigis koncernajn kamaradojn zorgantajn

(Daŭrigo sur la paĝo 19)


La Popola Deziro

— PAROLOJ DE DIVERSRONDAJ PERSONOJ PRI STARIGO DE LA DIPLOMATIA RILATO INTER ĈINIO KAJ USONO

LA Ĉina Popola Respubliko kaj la Unuiĝintaj Ŝtatoj de Ameriko decidis starigi diplomatan rilaton je la unua de januaro, 1979, kaj sendi ambasadoron unu al alia kaj fondi ambasadorejon en la unua de marto, 1979. Tio estas granda historia afero kaj vekis fortan eĥon en la mondo. Ĉisube estas paroloj de fame konataj personoj de nia lando pri tio.

Vang Bingnan, estro de la Ĉina Popola Asocio por Amikaj Rilatoj kun Eksterlando kaj antaŭa delegito de nia lando en la ambasadora intertraktado de la ĉina kaj usona registaroj:

La ĉina kaj usona popoloj havas longan tradician amikecon. Sed, en la 29 jaroj post la fondiĝo de la Ĉina Popola Respubliko, la ŝtata rilato inter la du landoj trairis vojon longan kaj zigzagan. En 1955, Ĉefministro kaj Ministro de Eksteraj Aferoj Ĝoŭ Enlaj publikigis, laŭ la strategia penso de Prezidanto Maŭ Zedong, deklaron en la konferenco de Bandungo: “La ĉina popolo estas amika al la usona popolo. Ĝi ne volas militi kontraŭ Usono. La ĉina registaro volas trakti kaj diskuti kun la usona registaro la problemon pri mildigo de streĉa situacio en la Ekstrema Oriento, precipe pri tiu en Tajvan-regiono.” Kaj en la unua de aŭgusto de la sama jaro, en Ĝenevo, komenciĝis la ambasadora intertraktado de Ĉinio kaj Usono. Komisiite de niaj Partio kaj registaro mi kiel delegito partoprenis en la intertraktado. La registaro de nia lando estis sincera al la intertraktado, sed la du landoj ne atingis interkonsenton pro la esenca problemo de Tajvan post pli-ol-100-foja intertraktado dum 9 jaroj. Internaciaj opinioj nomis ĝin “maratona” intertraktado. Spite tion, Ĉefministro Ĝoŭ Enlaj montris siatempe, ke kontaktiĝo estas utila al la du flankoj por kompreni reciproke vidpunkton, kaj al la du grandaj landoj kiel Ĉinio kaj Usono ne devas manki tia neoficiala kontakta kanalo. En 1958, kiam la



Vang Bingnan

intertraktado okazis en Varsovio, Prezidanto Maŭ diris al mi, ke en la intertraktado mi diru eksplicite al la usona delegito: Usono estas granda lando, ankaŭ Ĉinio estas nemalgranda, kaj ke mi admonu la usonan registaron ke ĝi ne kontraŭstaru al la ĉina popolo pro Tajvan. Li montris ankaŭ, ke en la intertraktado mi devas persisti ĉe la principo kaj atenti pri maniero kaj ne devas vundi la sentimenton de la usona popolo. Kaj la problemo de Tajvan estos certe solvita; por tio ni povas atendi dek jarojn, dudek jarojn, eĉ cent jarojn. Sed pli frue solvi la problemon estas utile al la du landoj.

Gis 1971 la longa ambasadora intertraktado havis gravan turniĝon. Doktoro H. Kissinger venis al Ĉinio kaj poste, Prezidanto Nixon vizitis Ĉinion, la gvidantoj de la du landoj okazigis la altrangan interparoladon, kio rezultigis la Komunan Komunikon de Ŝanhajo. Forpasis ses jaroj. Dank’ al kontaktiĝo kaj klopodado de la du flankoj, finfine la interkonsento pri normaligo de la diplomatia rilato estis atingita kaj efektiviĝis la longtempa deziro de la du popoloj.

Tio estas longtempa frukto de klopodo de la du popoloj. Ĝuste kiel Ĉefministro Ĝoŭ Enlaj plurfoje diris okaze de intertraktado de la ĉina-

japana rilato: “Oni ne devas forgesi la putofosantojn, kiam ili trinkas akvon.” Ni alte taksas diversrondajn amikojn de Usono, kiuj faris multajn laborojn kaj grandan kontribuon por la amikeco inter la ĉina kaj usona popoloj kaj normaligo de diplomatia rilato inter la du landoj, kaj gravuros tion en nian koron por ĉiam.



Göu Pejjuan


Göu Pejjuan, fama sciencisto kaj vicestro de la Ĉina Akademio de Sciencoj:

Informiĝinte pri la starigo de la ĉina-usona diplomatia rilato, mi tre ĝojas. Ĝi estas venka frukto de la du popoloj de Ĉinio kaj Usono en komuna klopodado kaj markis, ke komenciĝis nova historia periodo por la amikaj kontaktoj de la du popoloj en diversaj kampoj.

La du popoloj de Ĉinio kaj Usono havas profundan tradician amikecon. La normaligo de la ĉina-usona diplomatia rilato konformas al la komuna deziro de la du popoloj. Ekde la jaro 1972, kiam Ĉinio kaj Usono publikigis la Komunan Komunikon de Ŝanhajo, kaj la interŝanĝoj de scienco, tekniko, kulturo, eduko kaj komerco inter la du popoloj disvolviĝis jaron post jaro. En 1975 la Delegacio de la Scienca-Teknika Asocio de la Ĉina Popola Respubliko sub mia gvido vizitis Usonon kaj estis varme akceptata de la usonaj popolo kaj sciencistoj. Kaj en oktobro de 1978, la Ĉina Eduka Delegacio sub mia gvido vizitis Usonon kaj traktis kun la usona delegacio pri studentoj-interŝanĝo kaj reciproka vizito de la dulandaj sciencistoj. La du flankoj atingis interkonsenton en tre mallonga tempo laŭ la spirito de la Komuna Komunikado de Ŝanhajo. En la kuranta jaro ni sendos ĉinajn

studentojn kaj eruditojn al Usono kaj ankaŭ la lasta sendos siajn al Ĉinio por lernado kaj fari sciencajn esplorojn. Mi kredas, ke post normaligo de la ĉina-usona diplomatia rilato tiuflanka interŝanĝo pluapase firmigos la tradician amikecon kaj interkompreniĝon inter la du popoloj.

La usona popolo estas granda popolo. Nur en pli ol 200 jaroj ĝi faris sian patrolandon moderna lando kun avangardaj industrio, agrikulturo kaj scienco kaj teknikoj. La normaligo de la diplomatia rilato kreis pli favoran kondiĉon, por ke ni lernu de la usona popolo avangardajn sciencojn kaj teknikojn kaj administradon de modernaj entreprenoj.



Geng Mingji (dekstre)

Geng Mingji, fama tablotenisa sportistino:

La normaligo de la diplomatia rilato inter Ĉinio kaj Usono estas granda historia afero arde dezirata de la popoloj de la du landoj, kaj ankaŭ la popoloj de la tuta mondo certe ĝojos pro tio. En 1971, la malgranda arĝenta pilko malfermis la pordon de amika kontaktiĝo de la du popoloj. Post la 31-a monda tablotenisa ĉampioneco ni invitis la usonan tablotenisan trupon al Ĉinio. Tio estis la unua vizito de usona popola organizo al la nova Ĉinio. Ĉefministro Göu Enlaj siatempe afable akceptis ilin kaj diris: “Ni kredas, ke la amika kontaktiĝo inter la du popoloj estos aprobata kaj subtenita de la plejparto de la du popoloj.”

Kuraĝigate de la spirito de la Komuna Komunikado de Ŝanhajo, la ĉina tablotenisa trupo vizi-

tis Usonon en 1972. Dum la 18 tagoj en Usono mi ĝuis profundan amikecon de la usona popolo al la ĉina popolo. Usonaj amikoj kiujn ni renkontis ĉie ajn diris: “Ni esperas koni Ĉinion kaj ke niaj du popoloj havos pli da amikaj kontaktoj.” En Novjorko iu usona virino varme ĉirkaŭbrakumis min kaj diris kun larmoj: “Certe efektiviĝos la normaligo de la diplomatia rilato inter Usono kaj Ĉinio.” Hodiaŭ, tiu deziro vere efektiviĝis! En la estonto ni daŭre klopodos por plie akceli la grandan amikecon inter la ĉina kaj usona popoloj per la arĝenta pilko.



Du Juming

S-ro Du Juming, membro de la Kvina Tutlanda Komitato de la Ĉina Popola Politika Interkonsiliga Konferenco kaj antaŭa altranga generalo de Kuomintango:


Dum trinkado de akvo, oni devas memori ĝian fonton. Kiam ni kunvenas por celebri la stariĝon de la diplomatia rilato inter Ĉinio kaj Usono, ni des pli karmemoras la angulŝtono-metantojn Prezidanton Maŭ kaj Ĉefministron Ĝoŭ kaj des pli amas la Centran Komitaton de la Komunista Partio de Ĉinio estratan de Prezidanto Hua Guofeng. En 1971, kiam mia bofilo Jang Ĝenning venis al Ĉinio por vidi siajn parencojn, li diris al mi, ke la usona popolo esperas amikiĝi kun la ĉina popolo kaj ke la du landoj efektiviĝos la normaligon de diplomatia rilato kiel eble plej frue. Poste li multfoje venis al Ĉinio kaj havis kontakton kun kontinentaj popolanoj kaj ankaŭ kun personoj de Tajvan. El tio li konkludis, ke la popoloj de Usono kaj Ĉinio inkluzive de la popolo de Tajvan ĉiuj esperas ke Ĉinio kaj Usono pli frue starigos inter si diplomatian rilaton kaj

ke Tajvan pli frue revenos en la sinon de la patrolando. La malnovaj amikoj en la armeo kaj registaro de Tajvan devas kredi la politikon de la Komunista Partio de Ĉinio: Ĉiuj patriotoj ĉu fruaj aŭ malfruaj estas samfamilianoj de la patrolando; la Kompartio kaj la popolo de la patrolando neniam forgesos ĉiun ajn, kiu faros kontribuon por la unuigo de la patrolando, ne konsiderante ilian pasintan konduton. Jam 30 jarojn mi ne intervidiĝis kun tiuj amikoj kaj tre deziras paroli kun ili pri la amikeco, eĉ nur pri familia vivo sed ne pri politiko. Mi esperas, ke la instanco de Tajvan komprenos la koron de ni maljunuloj kaj donos oportunon por nia intervidiĝo.

Caj Hiaŭ, samlandano el Tajvan:

La oficiala starigo de la diplomatia rilato inter Ĉinio kaj Usono utilas al la paco kaj sekureco de Azio kaj la mondo kaj ankaŭ estas bato al la hegemoniaj landoj granda kaj malgranda, kiuj ĉie faras ekspansion kaj agreson. Pro tio ĝojas la popolo de la tuta mondo, ĝojas la popolo de la tuta lando kaj pli ĝojas niaj samlandanoj de Tajvan.

Prezidanto Hua montris en la ĵurnalista kunveno: “Tajvan estas la sankta teritorio de nia lando. La popolo de Tajvan estas niaj samlandanoj, la reveno de Tajvan en la sinon de la patrolando kaj efektiviĝo de la granda afero unuigi la patrolandon estas la komuna deziro de la tuta popolo inkluzive de la popolo de Tajvan.” Tiuj vortoj tute kaptis la koron de ni tajvan-aj samlandanoj kaj emociiĝis ni tajvan-anoj ĉu sur la kontinento aŭ sur Tajvan-insulo kaj en aliaj landoj. La samlandanoj de Tajvan estas parto de la ĉina nacio kaj estas ĉinoj, ili havas patriotan koron kaj sopiras al la granda patrolando. La unuigo de nia lando, la liberaj intervizado kaj kunvivado de parencoj estas komuna deziro de la popolo de la tuta Ĉinio kaj nerezistebla historia tendenco. De multaj jaroj la patriotaj samlandanoj de Tajvan klopodas senlace por la unuiga afero de la patrolando. Vidante la hodiaŭan bonan situacion, ni havas centoblan memfidon kaj, kune kun la tutlanda popolo, nepre dediĉos nian forton al la unuiga afero de la patrolando.



Laminata laborejo de la Anŝan-a Fera-ŝtala Kompanio

Granda Salto de Nia Produktado de Ŝtalo

de HIN HUA


EN la unua tagdeko de decembro, 1978, la ŝtala produktokvanto de nia lando superis 30 milionojn da tunoj. Je la jarfino ĝi atingis 31.7 milionojn da tunoj t. e. je pli ol 7,900,000 tunoj pli multe ol tiu de 1977, kaj tiu de fero atingis 34 milionojn da tunoj t. e. je 9,000,000 tunoj pli multe ol tiu de 1977. Ankaŭ tiu de neferaj metaloj kreskis. Tio estas la unua fojo en la ĉina historio, ke la produktokvantoj de ŝtalo kaj fero kreskis tiel multe en unu jaro.

Je la deka de decembro de 1978, nia metalurgia departemento ckazigis en Pekino la Tutlandan Kunvenon de Metalurgiaj Herooj por celebri tiun grandan sukceson. En la kunveno la Metalurgia Ministrejo honoris 20 individuojn per la titolo laborheroo kaj 20 kolektivojn per la titolo heroo kolektivo.

En la pasintaj pli ol dek jaroj, pro grava subfado de Lin Biaŭ kaj la “kvarpersona bando”, nia metalurgia industrio longtempe stagnis kaj eĉ regresis, kio gravege malhelpis la disvolviĝon

de la nacia ekonomio. La sukcesa produkto de pli ol 30 milionoj da tunoj da ŝtalo ne nur markis ke la metalurgia industrio de Ĉinio finis sian longtempan stagnadon, paŝis de restariĝo al progreso kaj eniris en la novan stadion de kontinua salto, sed ankaŭ liveris valoran sperton por rapide disvolvi la ferŝtalan industrion en la estonteco.

La politika situacio stabila kaj unuiĝa estas tre grava por rapidigi la disvolvon de nia metalurgia industrio. En la pasinta jaro, preskaŭ ĉiuj ferŝtalaj entreprenoj antaŭdate superplenumis la ŝtatan planon. La Ĉefurba Fera-ŝtala Kompanio kaj diversaj ŝtalaj fabrikoj de Ŝanhajo ĉiam relative bone produktas. En la pasinta jaro ne nur iliaj produktokvantoj grand-skale kreskis, sed ankaŭ iliaj diversaj teknikaj kaj ekonomiaj normoj ĉiuj faris unu paŝon antaŭen al la progresintaj niveloj en- kaj eksterlandaj. La Baŭtoŭ-a Fera-ŝtala Kompanio, konstruita antaŭ 17 jaroj kun investo de 1700 milionoj da juanoj, tamen neniam plenuminta la ŝtatan planon



Ŝtala produkto
(* 1 = 1,000,000 tunoj)

en la pasintaj 17 jaroj, unuafoje donis profiton de pli ol 10,000,000 juanoj al la ŝtato en 1978. Ankaŭ la Vuhan-a Fera-ŝtala Kompanio kaj la Tajjuan-a Fera-ŝtala Kompanio, kiuj longtempe troviĝis en postiĝinteco, plenumis la jaran produktan planon de la ŝtato antaŭdate je pli ol 20 tagoj.


Ankaŭ la kontinua alta produkto estas unu el la karakterizoj de la fera-ŝtala produktado de Ĉinio en 1978. Ekde la komenco de la lasta jaro, la produktokvantoj ĉiumonate kaj ĉiusezone atingis aŭ superis la difinitan nivelon. La plej altaj taga kaj monata rekordoj de la tuta lando estis senĉese rompataj. La diversaj procedoj de minekspluatado, ercoselektado, ŝtaligado kaj laminatado ĉiuj havis sian grandan atingon. Kaj ĉiuj normoj teknikaj kaj ekonomiaj havis sian rimarkindan progreson. En 1978 la produktokosto de nia fera-ŝtala industrio reduktiĝis je pli ol 9% kompare kun tiu de 1977, la deficito je pli ol 50% kaj la profito donita al la ŝtato kreskis je pli ol 100%. Ankaŭ la scienca esplorado de metalurgia industrio akiris multajn fruktojn en la pasinta jaro.

Kvankam la produkto de 30 milionoj da tunoj da ŝtalo estas tre granda atingo por nia lando,

tamen tiu nivelo estas ankoraŭ tre malalta por la 800 milionoj da popolanoj, kaj malproksime sub la postulata por efektivi la modernigon de industrio, agrikulturo, nacidefendo kaj scienco kaj tekniko, kaj la nunaj kvalito, specoj kaj normoj ankoraŭ ne povas kontentigi la bezonojn de la ŝtato. Nun nia lando devas elspezi grandan sumon de fremdlanda mono ĉiujare por importi certan kvanton da ŝtalo. Metalurgio estas baza industrio, la rapideco de ĝia disvolviĝo havas grandan influon al la efektivigo de la kvar modernigoj. Por modernigi la metalurgian industrion, oni devas koncentri la ĉefan forton al porprodukta konstruado kaj teknika revolucio. La malnovaj entreprenoj devas plene ludi sian rolon, energie fari teknikan renovigon kaj laborigi latentajn fortojn; kaj sur la bazo de sendependeco kaj memstareco kaj sinapogo sur la propraj fortoj, oni devas aktive alpreni progresintajn teknikojn eksterlandajn per internacie kutimaj rimedoj utilaj al nia lando kaj konstrui novajn ŝtalajn bazojn.

En la nova jaro ĉiuj laboristoj kaj oficistoj de la metalurgia industria fronto klopodos, laŭ la linio de la Centra Komitato de la Partio kaj la ĝenerala tasko elmetita de la Kvina Tutlanda Popola Kongreso, por plenumi la produktajn planojn de fero kaj ŝtalo kaj neferaĵoj de la kuranta jaro, kaj per tio omaĝi al la 30-a datreveno de la fondiĝo de la popola respubliko.

Laborejo de la Ŝanhaja Unua Fera-ŝtala Kompanio



Verda Majo en Ĉinio



Verda Majo

MEZE de aprilo, 1937, iu malalta virino kun “ruĝaj pomoj” sur la vangoj staris sur la ferdeko de brita ŝipo en Jokohama-haveno de Japanio, kaj mansvinge adiaŭis siajn parencojn — ŝi estis baldaŭ forlasonta la patrolandon, kie ŝi vivis jam dudek kvin jarojn, kaj forte batis ŝia koro.

Kiu estis ŝi? Pro kio ŝi volis disiĝi de siaj parencoj? Kien ŝi volis veturi?

Pri ĉio ĉi tio mi devas rakonti dekomence.

I

Ŝi nomiĝis Verda Majo (Esperante), Hasegaŭa Teru (japane). En la 7-a de marto, 1912, Teru naskiĝis en intelektula familio de Sarubaŝi, Jamanaŝi-gubernio, Japanio; ŝia patro estis inĝeniero de elektra kompanio. En sia infaneco, Teru jam montris rimarkindan saĝecon kaj talenton en literaturo. Poste, kiam ŝi lernis en meza kaj alta lernejoj, ŝi verkis nemalmultajn novelojn, eseojn kaj japanajn *tanka*-ojn* per diversaj pseŭdonimoj.

En 1929, serioza ekonomia krizo atakis la kapitalisman mondon, la japana militarisma registaro intencis trovi elirejon per invado kaj ekspansio. En 1931, ĝi fabrikis en la Nordoriento de Ĉinio la “Eventon de la 18-a de Septembro”. Kaj poste ĝi unuflanke daŭrigis sian invadon kaj ekspansion, aliflanke praktikis militarisman edukadon enlande por plifortigi la ideologian regadon. La gejunuloj staris sur vojkruciĝo. Multaj el ili vojaris, tamen fraŭlino Teru ricevis revo-

lucian influon. Kiam ŝi finis la lernadon en mezlernejo, ŝi eniris en la Virinan Altan Normalan Lernejon de Nara, kaj tie ŝi ekkonis Esperanton. Ŝi ekamis la lingvon kaj decidis diligente ĝin lerni. Rimarkinde estis, ke post kelkaj jaroj, ŝi jam montris sian talenton en lingvolernado.

Tiam en Japanio multaj lernis Esperanton, inter kiuj troviĝis rimarkinda nombro de ĉinaj studentoj en Japanio. Ili estis revoluciemaj kaj ofte partoprenis en progresemaĵ studentaj movadoj. En 1931, fondiĝis la Japana Proleta Esperantista Unio, kun S-ro Akita Ujaku, fame konata progresema dramisto, kiel sia prezidanto. La japana sekreta polico prenis ĝin kiel bazan organizaĵon de la “ekstreme maldekstra” Japana Kompartio, kaj metis ankaŭ la nomon de Hasegaŭa Teru en nigran liston. La “Evento de la 18-a de Septembro” multe skuis Teru, kiu tuj esprimis sian fortan proteston. En sia letero de la 9-a de junio, 1932, ŝi skribis al sia amikino: “Kiel unu el la reformistoj en la plej malalta socitavolo, kiel virino kaj edukito, mi firme persistis en la direkto neniam ŝancelebla.” Pro tio, en oktobro de 1932, nome unu jaron post la “Evento de la 18-a de Septembro”, kiam ŝi lernis en la kvara klaso de la lernejo, ŝi estis arestita de la reakcia aŭtoritato kun preteksto de “ideologia problemo”, kaj post liberiĝo, ŝi estis eksigita el la lernejo. Sed ĉio ĉi tio neniom ŝancelis ŝin kiel ŝi skribis al sia amikino: “Unuvorte mi volas ankoraŭ tiel agi kiel mi pensas.”

Ŝia familio estis tre maltrankvila pro ŝia arestiĝo, kaj opiniis ke ŝi ne povos plu resti hejme, kaj lasis ŝin loĝi ĉe iu parenco en la urbo Moĵi. Post du monatoj, ŝi sekrete eliris kaj venis al Tokio, kaj tie ŝi eklaboris en la Japana Esperanta Instituto.

De tiam, ŝi komencis sian vivon kiel esperantistino. Unuflanke ŝi entreprenis progreseman aktivadon de Esperanto, aliflanke ŝi faris tradukadon kaj verkadon per Esperanto. Tiam ŝi ekuzis Verdan Majon kiel sian esperantan pseŭdonimon. En 1935, la japana "Esperanta Literaturo" aperigis ŝian esperantan tradukon de iu fama japana klasika literatura verko. Kaj en la sama jaro, la gazeto aperigis ŝian unuan esperantan novelon "Monologo de Juna Esperantistino", kiu priskribas la rilaton inter knabino lernanta Esperanton kaj ŝia patrino, kaj per tio ŝi esprimis sian fortan deziron al progreso. Ŝi ankaŭ tradukis "Kankrokaptista Ŝipo", la ĉefverkon de la fama japana progresema verkisto Kobajaŝi Takiji k.a. Kaj en februaro de la sama jaro, laŭ peto de "La Mondo", organo de la Ŝanhaja Esperantista Ligo, Verda Majo skribis artikolon "Virina Stato en Japanio" por rememori la datrevenon de la Internacia Virina Tago en la 8-a de Marto. Tio estis ŝia unua kontakto kun la ĉina esperanta movado.

Ŝia patrino estis tre maltrankvila pro tio ke ŝi tiel energie faris progreseman esperantan movadon. Malgraŭ tio ŝi prenis Pavel-on, unu el la gvidantoj de laborista movado en la romano de Gorkij "Patrino", kaj Vatanabe Masanosuke kaj Kobajaŝi Takiji, la eminentajn gvidantojn de la Japana Kompartio kiel siajn lernindajn ekzemplojn.

La esperanta aktivado ne nur donis al Verda Majo instigon kaj esperon, sed ankaŭ konigis ŝin al multaj japanaj kaj ĉinaj esperantistoj. El la ĉinaj studentoj en Japanio, troviĝis iu studento de la Tokia Alta Normala Instituto nomata Liu Ĵen. Post multfoja kontaktado ili ekamis unu la alian. Tiam la japanoj malestimis ĉinojn pro diversaj kaŭzoj, precipe virinoj kun certa pozicio kaj rango ne volis edziniĝi al ĉinoj. La Virina Alta Normala Lernejo de Nara estis fama en Japanio, tial estis ne banala afero ke ĝia lernan-

tino Hasegaŭa Teru enamiĝis kun la ĉina junulo. En 1936, malgraŭ malaprobo de la socio kaj la familio, ŝi edziniĝis al Liu Ĵen.

En tiu tempo la japanaj militaristoj ege furiozis. Post okupo de la ĉina Nordoriento, ili daŭrigis sian invadon al la interna parto de Ĉinio. Sub la alvoko de la Komunista Partio de Ĉinio starigi la Kontraŭjapanan Nacian Unuecan Fronton, la ĉina popolo tajde leviĝis kun forta postulo de batalo kontraŭ la japana militarismo. Kaj la ĉinaj studentoj tiam en Japanio revenis unuj post aliaj al sia patrolando. En januaro de 1937, Liu Ĵen la unua revenis al Ŝanhajo, ĉar Ŝanhajo siatempe estis centro de la ĉina revolucia esperanta movado.

En la aprila Japanio, pompis printempo kaj prosperis sakurfloroj. Sed ĉio tio neniom altiris la atenton de Verda Majo, ĉar ŝin alvokis nova kaj pli multe signifa vivo. Ŝi forvendis siajn librojn, vestojn k. a. kaj kun skribomaŝino kaj simpla pakajo sekrete suriris la vojon al Ĉinio.

Nokte, ŝi staris sur la ferdeko, kaj antaŭ ŝi kuŝis la libera maro. "Ĝi apartigas min de la

La familio de Verda Majo: sidas la gepatroj kaj staras (de maldekstre) Verda Majo, ŝia pli juna frato kaj ŝia pliaĝa fratino.



patrio, de miaj karaj, ĝi tamen kondukos min al la nova vivo, al novaj amikoj.” “Adiaŭ, mia patrio, miaj karaj.”

II

Ŝanhajo estis la unua ĉina loko kie Verda Majo vivis, tial ĝi donis al ŝi neforgeseblan impreson.

En Ŝanhajo, la “edeno de aventuristoj”, estis unuflanke kalejdoskopa diboĉa vivo de riĉaj eminentuloj kaj gigantaj komercistoj, aliflanke ĉifonaj kaj malsataj malriĉuloj. Poste, en sia verko “En Ĉinio Batalanta” Verda Majo priskribis tion, ke “. . .krom la kunesto de l’ duonnudaj kulioj kaj luksaj ĉielskrapaĵoj, estas nenio alia, kio povus pli elokvente klarigi la esencon de Ŝanhajo, la tipa urbo de duonkolonia Ĉinio.” “Mi ne amas Ŝanhajon. Ĝi imagigas al mi dismembrigitan korpon, kaj tiu imago estas dolora.”

Atinginte Ĉinion, ŝi ne scipovis paroli ĉine, nek havis ekonomian fonton, dum spionoj, policanoj k.a. neinvititaj gastoj ŝin sekvis. Pro tio ŝi kaj la edzo loĝis kune kun amika paro sur la dua etaĝo de iu domo en la franca koncesia kvartalo. Malfacile tiam ili vivis. Ĉiutage ili povis manĝi nur dufoje. Ŝi diligente lernis paroli ĉine. Foje, kiam ŝi povis tute kompreni kaj ripeti la interparolon de ŝiaj edzo kaj amiko vorto post vorto, ŝi ekkriis ĝoje kiel infano.

En Ŝanhajo ŝi konatiĝis kun novaj geamikoj kaj novaj geesperantistoj. Ŝi helpe laboris en la Ŝanhaja Esperantista Ligo. Ŝi verkis, korektis kaj maŝinskribis artikolojn, por kune kun la lokaj esperantistoj eldoni esperantan gazeton “Ĉinio Hurlas”. En sia letero “Al Japanaj Esperantistoj” ŝi skribis: “Kunlabori por ‘Ĉinio Hurlas’ kaj aliaj por mi ne signifas simple, ke unu fremda esperantisto dediĉas sian mizeran teknikon por eldoni maldikan gazeton. Kiam mi prenas plumon, en mi ekbolas la sango pro premata justo, ekflamas indigno kontraŭ la bruta malamiko. Mi sentas ĝojon: mi estas kun la ĉina popolo!”

En Ŝanhajo ŝi spertis plurajn historiajn eventojn.

En junio de 1937, du monatojn post ŝia atingo al Ŝanhajo, ŝanhajaj popolanoj de diversaj ron-

*Memore al la
geedziĝo (1936)*



doj okazigis manifestacion postulante liberigon de la “sep nacistavuloj” inkluzive de Ŝen Gjunju kaj Zoŭ Taŭfen. La kolono de la manifestacio marŝis ĉiuminute plilonĝigante kaj plivastigante. La granda sceno tiel emociis Majon, ke ŝi povis neniel sin deteni kaj senhezite eniris en la vicaron. “Kredeble sola fremdulo, ununura japano inter ili. Sed kial mi ne partoprenu? Ankaŭ mi havas rajton kaj devon postuli liberigon de ĉinaj patriotoj. Mia koro batas kune kun iliaj, mia sango bolas samkiel iliaj, . . .” Kaj spite la policanajn glavojn marŝadis la kolono de la manifestacio.

Ŝi partoprenis en la batalo ankaŭ kun sia plumo. Nelonge post sia veno al Ŝanhajo, ŝi tradukis la artikolon “Kiel Ekfloris la Floro?”, kies aŭtoro estis oficiro de la Nordorienta Armeo, kaj aperigis ĝin per la ĉina nomo “Liu Menghuj” en la oka numero de “Nihon Hjoro” (“Japana Revuo”), 1937. La artikolo priskribis la “Eventon de la 12-a de Decembro”, kiu montris la postulon de la ĉinaj armeo kaj popolo pri rezistado kontraŭ japana invado kaj la batalon kontraŭ la interna milito sub la gvido de la Komunista Partio de Ĉinio kaj influo de la kontraŭjapana nacistava movado fare de studentoj en la 9-a de decembro. Ĝi opiniis, ke la evento kvazaŭ bombo en la manoj de la popolo ne nur certe disrompos la landopereigan politikon de Ĉiang

Kajŝek kaj Kuomintango “unue kvietigi la landon, poste rezisti kontraŭ eksterlando”, sed ankaŭ briligis efektive la meĉon de la rezista batalo tra la tuta lando.

Unu semajnon post la “Evento de la 7-a de Julio”, Verda Majo partoprenis en la 50-jara jubileo de Esperanto, aranĝita de la Ŝanhaja Esperantista Ligo, en la sidejo de la Ningbo-a Samlokana Asocio, kiun ĉeestis pli ol 300 esperantistoj. Post la Evento de la 7-a de Julio, la maltrankvilo en la socio kaj ekscitiĝo de la popolo penetris ankaŭ en la esp-istan kunvenejon. Ŝi opiniis ke la idealo de la ĉinaj esperantistoj kaj tiu de la ĉinaj popolanoj tute identas. Ili ne volis esti subpremataj de aliaj nacioj nek subpremi aliajn. Jam delonge la ĉinaj esperantistoj levis alten la standardon sur kiu estis skribite: “Per Esperanto por la liberigo de Ĉinio!”

La fajro de la “Evento de la 7-a de Julio” fine envolvis la urbon Ŝanhajon. La 13-an de aŭgusto, por Verda Majo, estis “tago grandioza, tago sange gravurita”.

En Ŝanhajo, ŝi propraokule vidis kiel la japanaj invadantoj portis al la ĉina popolo grandan katastrofon. Tage kanonoj bombardis kaj aeroplanoj senbride bombis kaj maŝinpafis, dum nokte la brulegoj en Ĉapej kaj Nansi kvazaŭ du vul-

(Daŭrigo de la paĝo 10)

domkonstruadon, ke la novaj loĝdomoj por profesoroj kaj instruistoj devas enhavi laborĉambrojn. Li diris: “Laborĉambro estas nepre bezonata de instruistoj, kaj sen tio ili ne povas bone labori.”

Laŭ la plano de la Eduka Ministerio la Nankina Universitato varbis 1,330 novajn studentojn en 1978. Por kulturi pli multajn homojn, la lernejo decidis plimultigi la nombron de novaj studentoj je 730. Kaj pro tio ne sufiĉis klasĉambroj. La rektoro do proponis konstrui simplajn klasĉambrojn. La vicestro kondukis nin al la konstruejo, kaj ties respondeculo diris, ke ĉiutage la rektoro venis al la konstruejo por rigardi la laboradon. Li planas konstruigi en estontaj 8 jaroj instruajn domojn, bibliotekon kaj loĝdomojn

kanoj lekis la noktan ĉielon. Senarmilaj urbanoj helpkriis, kuradis kaj ĝemis, kaj falis vico post vico en sangon kaj ruinojn. . . Ŝi vidis ankaŭ kiel la ĉinaj armeanoj kaj popolanoj heroe batalis unuj sekvante aliajn. Je tio, ŝi ofte emociiĝis ĝis larmoj. Ĉar ŝi estis esperantistino, ŝi volis batali, per Esperanto kiel armilo, kontraŭ la japana imperiismo, tamen certe ne kontraŭ la japana popolo.

En sia letero titolita per “Venko de Ĉinio Estas Ŝlosilo al la Morgaŭo de Tuta Azio”, ŝi diris al la japanaj esperantistoj: “Kiu volas, nomu min perfidulo! Mi neniam timas. Prefere mi hontus, ke mi estas samnaciono de tiuj, kiuj ne nur invadas alies landon, sed ankaŭ tiel indiferece faras surteran inferon el senkulpaj kaj senhelpaj rifuĝintoj.” Kaj ŝi antaŭvidis, ke “La venko de Ĉinio en tiu ĉi milito signifas ne nur liberigon de ĉina nacio sed ankaŭ tiun de ĉiuj premataj popoloj en la Ekstrema Oriento inkluzive la japanan. Ĝi ja estas la ŝlosilo al la morgaŭo de tuta Azio, de l’ homaro.”

En Ŝanhajo Verda Majo decideme faris la unuan paŝon al la nova vivo.

**Tanka-o estas japana fiksfirma poemo konsistanta el 31 silaboj.*

(Daŭrigota)

kun totala areo de 400,000 kvadrataj metroj, t.e. pli-ol-2-oblo de tiu en la pasintaj 76 jaroj.

Ĉiuj diris, ke la ĉiutaga labortempo de Kuang Jaming estas plej longa en la lernejo. Li tre frue venas al laboro kaj preskaŭ ĉiutage plej malfrue forlasas la kabineton. Iu demandis lin, kial li lasas sin tiel intense okupata. Li diris: “Mi jam aĝas 72 jarojn, kaj malmulta tempo restos por mi. En 1985 mi atingos 80 jarojn. En la estontaj ok jaroj mi devos kiel eble plej multe labori por kontribui al efektivigo de la kvar modernigoj, kaj nur tiel mi povos iri vidi Marks kaj Prezidanton Maŭ sen konscienciproĉo.”

Kiam ni finis intervjuon en la Nankina Universitato li estis sin preparanta por viziti Japanion kun delegacio de rektoroj de ĉinaj altaj lernejoj sub sia gvido.

Disvolvo de Socialisma Demokratio

DE la lasta vintro, aperis sur iuj stratoj de Pekino multaj dazibaŭoj*. Iuj el ili aprobis la proklamon de la Pekina Komitato de KPC, ke la Tian-anmen-evento okazinta en 1976 estas revolucia, aliaj postulis plifortigon de demokratio kaj leĝa sistemo, triaj esprimis siajn vidpunktojn pri iuj problemoj, kvaraj elmetis kritikojn pri iuj laboroj. . . Tiuj dazibaŭoj altiris atenton de nemalmultaj ĉinoj kaj eksterlandanoj.

Skribi dazibaŭojn estas laŭkonstitucia rajto de la popolanoj de nia lando. La fakto, ke popolanoj libere esprimas siajn opiniojn per dazibaŭoj, estas natura sekvo de restarigo kaj disvolvo de socialisma demokratio post la faligo de la “kvarpersona bando”, ĝi estas normala fenomeno kaj manifestiĝo de la stabileco de la enlanda situacio de Ĉinio.

I

La socialisma demokratio de nia lando manifestiĝas en diversaj formoj. Oni povas esprimi siajn opiniojn sur dazibaŭoj kaj ĵurnaloj.

Nun, preskaŭ en ĉiu tago, vi povas rimarki en ĉinaj ĵurnaloj opiniojn kaj postulojn elmetitajn de popolanoj: “Mi esperas, ke oni produktos multe da ekipaĵoj por malgrandaj elektrejoj”; “En nia loko ne troviĝas vendejo de monataj biletoj por trolebuso kaj aŭtobuso nek butikoj de ĵurnaloj kaj gazetoj”; “Ĉu tia sinteno de komizoj en la magazeno estas tolerebla”; “Oni ne devas ĉikani la montanojn”; “Tia gvidanto estas dezirinda por ni”; “Ni bezonas tian lernejestron”...

En la ĵurnaloj estas publikigitaj ne nur proponoj, kritikoj al mankoj en laboroj kaj laŭdado de bonaj homoj kaj aferoj, sed ankaŭ diskutado pri tiaj gravaj problemoj kiel demokratio, leĝa sistemo k. s. Studento de la Pekina Telekomunika Instituto skribis: “Mi venis el kamparo. La brigadestroj de nia loko estas nomumitaj de la partia organizo kaj la kadroj de la komunumoj kaj gubernioj estas alsenditaj de superaj instancoj.” Tia nomumado de kadroj povas “estigi burokra-

tismon”, “apartigi la ŝtatajn organojn disde la popolo”, “favoras al enpotenciĝo de konspiristoj kaj karieristoj”. Li proponis preni demokratian elektadon kiel gravan vojon por elekti kadrojn.

Iu de la Ministerio de Malpeza Industrio skribis: “Laŭ la nuna stato, ankoraŭ ne ekzistas maturaj kondiĉoj por fari demokratian elektadon laŭ maniero de la Pariza Komunumo en ĉiuj niveloj.” Li proponis, ke oni elektu kadrojn de laborejoj, sekcioj kaj aliaj bazaj unuoj, kaj la pli superaj estu zorge nomumitaj de superaj instancoj.

Iu studento de Fudan-universitato de Ŝanhajo skribis: “La esenco de la problemoj kuŝas en tio, ke la amasoj supervidu kaj kontrolu la laboron de la kadroj, por ke la lastaj estu veraj ‘servantoj de la socio’ sed ne ‘mastroj de la socio’, tial la sola fidinda rimedo por tio estas meti la kadrojn sub kontroladon de la amasoj” kaj “havigi veran rajton al la amasoj juĝi siajn kadrojn kaj diri opiniojn pri enoficigo kaj eksigo de ili.”

La vastaj amasoj disvolvis varman diskutadon per dazibaŭoj kaj en ĵurnaloj, pri multaj gravaj problemoj konfuzitaj de la “kvarpersona bando”, kiel ekzemple la rilatoj inter politiko kaj ekonomio, inter politiko kaj teknika laboro kaj inter politika kaj profesia kvalifikiteco, la principo “de ĉiu laŭ lia povo kaj al ĉiu laŭ lia laboro” kaj necesaj regularoj kaj sistemoj en administrado de entreprenoj. Dank’ al tio, iom post iom la amasoj akiris bonan konon pri la problemoj kaj vigliĝis ilia demokratia spirito, kio forte akcelos la modernigon de agrikulturo, industrio, naci-defendo kaj scienco kaj teknikoj de nia lando.

II

Dum la periodo, kiam la “kvarpersona bando” tiranadis, ĉiu ajn, kiu elmetis opinion kontraŭ ili, estis senescepte batita aŭ persekutita. Hodiaŭ jam estas tute malsame, kaj ĉiu ajn el la popolamasoj povas fari akran kritikon al la gvidantaj kadroj de ĉiuj niveloj.

En la lasta oktobro, Hi Ĝonghjun, la dua sekretario de la partia komitato de Guangdong-provinco (nun la unua sekretario) ricevis leteron de iu kadro de Hujjang-subprovinco: “Mi neniam vidis vin. Mi nur aŭdis vian paroladon pere de iu kamarado kaj legis viajn instrukciojn publikigitajn sur ĵurnalo. En tio mi ricevis la impreson, ke vi ŝatas aŭskulti raportojn de subuloj pri sia laboro, belajn parolojn kaj fanfaronojn. Ekzemple, en via parolado en la kunveno de la partiaj konstantaj komitatoj de la subprovincoj Mejhian, Ŝantoŭ kaj Hujjang, vi plurfoje montris, ke la reordigado de Tonghu-lago de Hujjang estas bona kaj X hektaroj da kampoj profitis de ĝi. . . Tio ja rezultas el via aŭskultado de raportoj. Sed kiel opinias la amasoj pri tio? Kion ili diras pri tio? Ĉu vi povus iri al ili por aŭskulti? Ĉu la afero estas vere tiel bela kiel la gvidantoj de la subprovinco de Hujjang priskribis? Mi konsilas al vi, ke vi iru aŭskulti la opiniojn de la amasoj.”

Hi Ĝonghjun trovis tiun leteron tre atentinda. Li laŭtlegis ĝin en kunveno de la revolucia komitato de la provinco kaj rimarkigis: “La letero estas bona, kaj la kritikoj en ĝi eĉ povas esti pli akraj. Estas bona afero, ke la kadroj de bazaj niveloj kuraĝas fari kritikojn. Ni devas subteni kaj kuraĝigi tion kaj ne timi vortojn akrajn. La skribinto fidus min kaj kredas, ke mi ne venĝos al li.” Li mem respondis al tiu kamarado: “Tre bona estas via letero de la 25-a de septembro. Mi sincere akceptas viajn trafajn kritikojn pri ekzistantaj mankoj en la animstato kaj laborstilo de la gvidantaj grupoj de diversaj niveloj, precipe de la respondecaj kadroj, kaj mi decidis diskonigi vian leteron en ĉiuj lokoj de la provinco, por pliapaŝe disvolvi demokratian atmosferon en la Partio.” Kaj krome, li komisiis alian sekretarion de la provinca partia komitato, kiu iris al Hujjang por doni helpon en tiea laboro, ke li danku la kadron, kiu skribis la leteron. La fakto, ke sekretario de provinca partia komitato tiel modeste kaj serioze traktis leteron de ordinara kadro, montris, ke hodiaŭ la demokratia atmosfero en nia lando iom post iom kreskas, sub la gvidado de la Centra Komitato de la Partio estrata de Kamarado Hua Guofeng.

Por pli bone praktiki socialisman demokration kaj ĝustatempe trovi kaj korekti mankojn kaj erarojn en la laboroj, nun multaj partiaj kaj registaraj institucioj centraj kaj lokaj restarigis aŭ fondis specialan fakon por trakti leterojn alsenditajn de la popolamaso kaj akcepti popolanojn-vizitantojn. Gvidantaj kadroj de partiaj komitatoj de multaj lokoj eĉ starigis deĵoran sistemon por persone akcepti popolanojn-vizitantojn, interparoli kun ili kaj trakti iliajn problemojn. La sekretario de la partia komitato de Anhuj-provinco mem iris al la loĝejoj de la popolanoj-vizitantoj por helpi ilin en solvo de problemoj de loĝado kaj manĝado. Iu sekretario de la partia komitato de Gansu-provinco persone akceptis pli ol 200 vizitantojn popolanojn kaj traktis pli ol 40 plendojn dum sia du-monata laborado en helpo al la subprovinco Kingjang. Popolanoj ĝoje diris, ke restariĝas la antaŭa bona laborstilo de la kadroj de Jan-an.

III

En la pasinteco, la socialisma demokratio kaj leĝa sistemo de nia lando estis serioze atencitaj kaj multaj maljustaj kaj eraraj verdiktoj estis faritaj pro la subfosado de Lin Biao kaj la “kvarpersona bando”. Nun, socialisma demokratio estas praktikata, la leĝa sistemo estas restarigata kaj plifortigata, multaj maljustaj kaj eraraj verdiktoj estas ĝustigitaj kaj la reputacio de la mistraktitaj personoj estas restarigita.

Por fortigi la socialisman leĝan sistemon kaj garantii la demokratiajn rajtojn de la popolo, la partiaj kaj registaraj institucioj de ĉiuj niveloj estas nun atente traktantaj kontraŭleĝajn kazojn de baznivela kadroj, por ke neniu kontraŭleĝa ago restu sen puno. Severa kondamno al Ĝang Gongŝun kaj aliaj de Ŝulan-gubernio de Gilin-provinco pro ilia maljusta venĝo estas bona ekzemplo pri tio. Du Cunli, komunumano de Maanling-brigado de tiu gubernio malkaŝis, per letero al supera instanco, la erarojn de Ĝang Gongŝun, sekretario de la partia filio de tiu brigado, kaj aliaj, kaj pro tio li estis ligita per ŝnuro kaj torturita de ili. Informiĝinte pri tio, la partia komitato de la gubernio eksigis ilin de iliaj postenoj kaj ordonis, ke ili petu pardonon de Du Cunli kaj pagu la kuracan koston por li.

La disciplino de la Partio kaj la leĝoj de la ŝtato validas same por la altrangaj kadroj kiel por tiuj de la baza nivelo. Liu Decaj, antaŭa vicĉefkomandanto de la Ŝenjang-aj Trupoj, ĉefkomandanto de la Garnizona Regiono de Ljuda, la unua sekretario de la Kompartia Komitato de Ljuda kaj estro de la revolucia komitato de Ljuda, kaj Hjuan Ŝiming, sekretario de la Kompartia Komitato de Ljuda, k.a. grave malobservis la ŝtatan financon disciplinon per arbitra sankcio pri grandskala konstruado ekster la ŝtata plano. Ilia krimo estis denunciata de popolamaso, kaj enketado kune farita de la Ŝtata Plana Komisiono kaj la Financa Ministerio pruvis ilian kulpecon. La Ŝtata Konsilantaro kaj la Milita Komisiono de la Centra Komitato de KPC decidis eksigi Liu Decaj de liaj en- kaj eksterpartiaj oficoj, malaltigi liajn rangon kaj salajron kaj eksigi Hjuan Ŝiming de ĉiuj en- kaj eksterpartiaj oficoj, kaj elpeli lin el la Partio kaj la polico jam arestis lin laŭleĝe.

La kazo de Vang Vejckjun, vicsekretario de la kompartia komitato de Henan-provinco, estas alia ekzemplo. Doninte malbonan ekzemplon de

malobservo de la ŝtata financa disciplino, li entreprenis grandan konstruadon ekster la ŝtata plano per greno kaj mono donita de la ŝtato por helpi popolanojn suferantajn de naturaj katastrofoj, kio serioze malbone influis la efektivigon de la ŝtata konstrua plano kaj la vivon de la popolo en katastrofa regiono. Kaj krome li ankaŭ faris krimojn de koruptado kaj trompado al siaj subuloj kaj superuloj. Liaj krimoj estas malkaŝataj kaj kritikataj de la popolamasoj de la tuta provinco kaj li estos punata laŭ la disciplino de la Partio kaj la leĝoj de la ŝtato.

Ĉio ĉi tio montras, ke la socialisma leĝa sistemo de nia lando estas senĉese plifortigata kaj perfektigata, la demokratiaj rajtoj de la popolo estas garantiataj. Vicĉefministro Deng Hiaŭping diris dum intervjuo de fremdlanda ĵurnalisto, ke en Ĉinio regas stabileco kaj solidareco, kaj ĉiuj en la centra kaj loka niveloj tutkore klopodas por efektivigo de la kvar modernigoj. La Centra Komitato de la Partio estrata de Kamarado Hua Guofeng estas solidara kaj plena de memfido pri efektivigo de la kvar modernigoj.

** Grandliteraj afiŝoj de opinioj, proponoj kaj kritikoj.*

Esperanta Aktivado en Ĉengdu

Lastatempe nin atingis alia ĝojinda informo el la urbo Ĉengdu en Siĉuan-provinco. En decembro geesperantistoj de la nomita urbo okazigis memor-kunvenon por celebri la 39-an datrevenon de la skribo farita de Prezidanto Maŭ Zedong pri Esperanto kaj la 119-an datrevenon de la naskiĝo de D-ro L. L. Zamenhof. Profitante la ŝancon ili starigis Ĉengdu-an Esperantogrupon estratan de Kamarado Liu Hongkang, direktoro de la Ĉengdu-a Financa kaj Ekonomia Instituto. La tasko difinita de la grupo estas lerni, uzi kaj disvastigi Esperanton por akceli la amikecon kaj interkompreniĝon inter ĉinaj kaj alilandaj esperantistoj, kaj en la intereso de la modernigo de nia konstruado.



Jadoskulptisto Vang Ŝusen

PARO da smeraldaj ornamaĵoj, por kunportado, kun figuroj de drako kaj fenikso estis multe laŭdita de vizitantoj pro la eminenta arto kaj bela formo en Porvenda Ekspozicio de Metiartaĵoj kaj Kapornamoj okazinta en Hongkongo. Lastatempe, mi speciale vizitis la verkinton de la nomitaj metiartaĵoj Vang Ŝusen, maljuna jadoskulptisto de la Fabriko de Jadaĵoj de Pekino, kiu estas nomata kiel unu el la “kvar elstaraj artistoj” de jadoskulptado de Pekino.

RAKONTO PRI LA SMERALDAJ ORNAMAĴOJ

Enirinte la Fabrikon de Jadaĵoj de Pekino, mi aŭdis bruadon el la grize blua kvaretaĝa domo, kie oni prilaboris jadaĵojn. Ĉe angulo de la laborejo, mi vidis ke maljuna artisto Vang absorbite skulptas smeraldan ornamaĵon. Sur lia stablo kuŝis kelkaj pecoj de groteskaj ŝtonoj kaj vazo kun bela plumasparago (*Asparagus plumosus*). Informiĝinte pri mia intervjuo celo li diris senĝene: “Mi rakontu ekde la smeraldaj ornamaĵoj.”

La materialo de la paro da smeraldaj ornamaĵoj estis el du pecoj de smeraldo postrestintaj el farado de kapornamoj. Iliaj surfacoj estis preskaŭ tute kovritaj de nigra sablo. Tamen, la sperta Vang Ŝusen tuj konstatis, ke ili estas bonega materialo malfacile trovebla. Kaj en tri tutaj monatoj majstro Vang iom post iom tute elfosis per diamanta borilo la nigrajn punktojn. Kiam malkovriĝis la brileco kaj beleco de la gemoj, la manoj de Vang Ŝusen ekstremis pro emociiĝo. Li laboris kiel jadoskulptisto dum plejparto de sia vivo, tamen li neniam antaŭe trovis tiel brilan smeraldon! Juvelistoj scias, ke verdaj smeraldoj estas maloftaj kaj altvaloraj. Kaj tiuj pecoj estas ne nur grandaj kaj senmakulaj, sed ankaŭ altkvalitaj pro la egala koloro.

Vang Ŝusen tre ŝatas ilin, kaj post longa cerbumado li decidis fari el ili paron da smeraldaj ornamaĵoj kun figuroj de drako kaj fenikso, kiuj simbolas feliĉon. Li diligente laboris du monatojn, sur unu flanko de smeralda peco kun grandeco de alumeta skatolo li skulptis vivecplenan drakon kaj sur la dorsflanko ĉinan ideografiaĵon signifantan “feliĉon”; kaj sur la alia same granda smeralda peco li skulptis vivecplenan fenikson kaj dorsflanke la ideografiaĵon signifantan “longan vivon”. En la supra parto de ĉiu peco li skulptis du papiliojn kaj inter tiuj la ideografiaĵoj signifantan “duobla ĝojo”.

ELSTARA ARTISTO DE JADOSKULPTADO

La jadaĵoj de Ĉinio estas fame konataj en kaj eksterlande. En dinastioj de Ŝang kaj Ĝou antaŭ 3,000 jaroj Ĉinio jam havis jadaĵojn uzatajn en diservo. Poste, la jada skulptarto estis kombinita kun la teknologio de metala inkrustado, kaj belaj jadaĵoj ornamaĵoj estis kunportitaj de princoj, dukoj kaj aliaj nobeloj, por montri iliajn poziciojn. Cirkulas anekdoto de la Epoko de Printempo kaj Aŭtuno kaj la Militantaj Regnoj (722 — 221 a.K.) pri “Repreno de Jadodisko”. Ĝaŭ-regno havis belan jadodiskon nomatan “Heŝibi”. La forta Kin-regno volis ĝin havi kaj trompis Ĝaŭ-regnon dirante ke ĝi volas doni 15 urbojn por ĝin akiri. La reganto de Ĝaŭ-regno timis, ke li ne ricevos la urbojn post transdono de la jadodisko. Ĝia ministro Lin Hiangju volonte prenis sur sin la taskon. Kiam li venis en Kin-regnon kun la jadodisko, li trovis, ke la reĝo de Kin-regno ne volas doni la urbojn, li do saĝe reprenis la jadojn kaj ĝin reportis al Ĝaŭ-regno. Peco da bela jado eble ne valoregalas al kelkaj urboj, tamen el tiu anekdoto oni povas plene vidi ĝian altan valoron. En dinastioj Ming (1368-1644 p.K.) kaj King (1644-1911


p.K.) Pekino kiel ĉefurbo fariĝis grava loko de produktado de famaj jadaĵoj kaj aperis en ĝi multaj fame konataj jadoskulptistoj. En la lastaj kelkdek jaroj, en la metiarto de jadaĵoj aperis 4 eminentaj majstroj, kaj Vang Ŝusen estas unu el ili. Li estas 62-jara kaj ekde sia 13-jara aĝo li jam komencis labori kiel skulptisto. Li estas lerta en skulptado de figuroj de arahatoj, Bodhi-dharma, sinjorinoj, maljunuloj kaj feoj. Liaj artaj verkoj estas unikaj en lerta projektado kaj delikata skulptado.

Majstro Vang multe penadis en utiligo de la naturaj koloroj kaj formoj de la krudaj jadpecoj. Foje li ricevis pecon da brila blanka jado bedaŭrinde kun nigra makulo kaj fendo. Lerte utiligante tiujn du mankojn li skulptis antikvan poeton Li Baj skribantan per peniko sur libro. La nigra makulo estis transformita en inkplenan penikan hartufon kaj la fendo fariĝis fendo de vesto de Li Baj. Lia majstra aranĝo estis admirata de multaj homoj. En la Tutlanda Ekspozicio de Metiartaĵoj de 1972 eksponiĝis agato kun akvo en ĝi, kiun Vang Ŝusen lerte turnis en grandiozan monton kun rekta pino kaj kuranta cerveto skulptante akvofalon el la blanka parto de la agato. Sub lamplumo spektatoroj povas klare vidi la puran akvon en la agato. Tiu elstara jada skulptaĵo estis laŭdata kiel brila perlo de la ekspozicio.

DILIGENTA LERNADO

Vang Ŝusen naskiĝis en familio de malriĉa kamparano de la antaŭurbo de Pekino, kaj kiam li estis 8-jara li eniris la urbon kun sia patro. Lia patro vivtenis sian familion per prilaboro de jadaĵoj por antikvaĵisto. Vang Ŝusen amas pentradon de sia juneco. Pro malriĉeco de sia familio li ne povis aĉeti penikojn kaj paperon, li do lernis pentri sur tero per peco de briko. Sub la influo de sia patro prilaboranta jadaĵojn li lernis skulpti ŝtonojn. Kiam li estis 13-jara, li jam sekrete ellernis la teknikon de jadoskulptado.

“Kiam la metilernantoj ellernis la teknikon, la majstro mortas de malsato.” Jen estis la proverbo vaste cirkulanta antaŭ la Liberiĝo. Ne povante trovi majstron li devis lerni de la vivo. Por bone skulpti kamelon li piediris malgraŭ




Vang Susen

frosto dekojn da lioj (1 lio = 1/2 kilometro) sekvante karavanon de kameloj. Li ofte staris ĉe montrofenestro de antikvaĵoj por atente priregardi jadaĵojn. Li ankaŭ ŝatis observi ŝvebantajn nubojn, kiuj aspektis jen kiel kurantaj ĉevaloj, jen kiel groteskaj rokoj. Ĉio tio multe riĉigis lian imagopovon. Vang Ŝusen, kiu vizitis elementan lernejon nur trijare, neniam lernis anatomion. Por koni la strukturon de homvizaĝo li klopodis multmaniere kaj finfine sukcesis.


Preskaŭ ĉiu homfiguro skulptita de Vang Ŝusen prezentas interesan historian epizodon. Majstro Vang sciigis min, ke liaj historiaj scioj estis akiritaj de rakontistoj de tetrinkejoj. Ekde sia infaneco li ŝatas aŭskulti en tetrinkejoj, rakontojn el klasikaj literaturaj verkoj kiel ekz. “Liaŭĝaj”, “Songo de Buduaro”, “La Tri Regnoĵ”, “Ĉe Akvorando”, “Notoj pri la Landoj de Orienta Ĝoŭ” ktp. La personoj en la historiaj rakontoj viveplene prezentiĝas en liaj jadaĵ skulptaĵoj.


Vang Ŝusen havas maksimumon: “Povas esti neuzata de mi, tamen ne nelernata de mi”. Per diligenta lernado li sorbadas neelĉerpeblajn artajn nutraĵojn el la vivo por senĉese riĉigi sian kreadon. En la pasintaj kelkdek jaroj, li vaste kolektis grandan kvanton de libroj, pentraĵoj, bildkartoĵ, poŝtmarkoj kaj novjaraj pentraĵoj por referenco. Dank’ al diligenta praktikado en 50 jaroj, Vang Ŝusen akiris elstaran jadoskulptan teknikon. Hodiaŭ, liaj jadaĵ skulptaĵoj interese aromas kiel vintraj umefloroj en- kaj eksterlande.

Mateno de Pekino



Ĉang-an-strato





La Ronda Urbo



Gingŝan-parko



Kvin Drakaj Kioskoj

Vizito al la Monturbo Ĉongking

de Nia Raportisto

BELA URBO

Ĉongking estas kurioza kaj bela monturbo. Ĝi situas en la orienta parto de Siĉuan-provinco kaj okcidente de la kunfluejo de la riveroj Jangzi kaj Gialing, kaj estas ĉirkaŭata de akvo en la norda, orienta kaj suda flankoj. Tio faris ĝin en mallarĝan kaj longan duon-insulon. La rivero Gialing kvazaŭ jada rubando fluas de la nordo al sudo en Jangzi-riveron, kiu kvazaŭ granda boao torentas de la okcidento al la oriento.

Ĉongking estas konstruita sur ondformaj montetoj kun granda dekliveco. Starante sur Ĝenvu-monto sude de Jangzi-rivero, mi rigardis al la urbo trans la rivero, ke tie diversaj konstruaĵoj staras unu super alia kaj zigzagaj vojoj kondukas unu al alia. Tre majesta estas la urbo. En vespero mi ascendis la altan rigardejon de Pibaŝan-parko en la urba centro kaj vidis, ke la sennombraj lamplumoj similaj al la brilaj steloj flagras inter la montoj kaj en la riveroj, kaj tiutempe mi sentis ke mi kvazaŭ vivus en mirlando.

En kaj ekster la urbo troviĝas multaj tuneloj, kiuj interligas stratojn kaj kvartalojn. La nove konstruita Geluoŝan-tunelo longas 705 metrojn. Ĉar la urbo troviĝas sur monto kaj ĉe rivero, oni konstruis tie diversajn kablotramojn por transporti varojn aŭ pasaĝerojn. Grandaj pontoj fervojaj kaj ŝoseaj staras super la riveroj.

Ĉongking kun historio de pli ol 3,000 jaroj estas unu el la famaj antikvaj urboj de Ĉinio. Novaj vizitantoj ne povas facile rimarki ĝian antikvan stilon. Nur post atenta observado, ili povas vidi la ruinan antikvan urbomuron, palaĉajn templojn, pagodojn kaj aliajn.

En Ĉongking sin trovas multaj vizitindejoj, kiel ekzemple, belarte aranĝita Norda Termofonto-parko, la Suda Termofonto-parko, kie oni povas remi en rivereto ombrata de floroj kaj


arboj, Hikju-parko kun raraj animaloj, Eling-parko kun miniaturaj pejzaĝoj en vazoj kaj Pibaŝan-parko por rigardi la noktan pejzaĝon.


GRANDAJ ŜANĜIĜOJ

Antaŭe mi dufoje vizitis Ĉongking, unufoje en la fino de la kvardekaj jaroj kaj duafoje en la komenca periodo post la Liberiĝo. Nun estas la tria fojo kaj mi rimarkis, ke al la urbo okazis multaj ŝanĝiĝoj.

Antaŭ la Liberiĝo, en Ĉongking ĉie troviĝis malaltaj budoj faritaj el bambu- kaj ligno-stangoj, lignaj tabuloj kaj bambuaj matoj ambaŭborde de la riveroj, kaj sennombraj danĝeraj domoj subtenataj de longaj lignaj stangoj timige staris duone sur montodeklivo kaj duone super rivero. Ĉie troviĝis palankenistoj, rikiŝistoj, ŝarĝoportistoj kaj aliaj kulioj. Por vivteni siajn familianojn, ili ŝultroporis palankenon kun

Vigla nokta foiro en Ĉongking





*La baldaŭ ekfunkcianta
Siĉuan-a Vinilona Fa-
briko*

riĉulo, aŭ pezan varon, trenis rikiŝon kun pasaĝero, malfacile paŝante sur centoj da ŝtupoj aŭ sur deklivaj stratoj. De tempo al tempo iuj el ili subite falis surteren kaj mortis pro malsato kaj frosto. Tiam multaj estis vetludejoj, opio-fumejoj, publikulinoj, vagistoj kaj almozuloj. Nun ĉiuj tiuj malbonaj fenomenoj estas forigitaj jam antaŭ tre longe.

Tiam en Ĉongking troviĝis tre malmultaj altaj domoj kaj belaj loĝdomoj apartenantaj al kuomintangaj altranguloj. Nun aperas multaj altaj konstruaĵoj kaj belaj loĝdomoj de laboristoj, multajn stratojn mi eĉ ne povas distingi. En la kvartalo Ĉaŭtianmen, kiu estis forbruligita de kuomintangaj spionoj en la jaro 1949, nun konstruiĝis vicoj da etaĝdomoj. Ĉirkaŭ la Liberiga Monumento en la urbocentro nove konstruiĝis etaĝdomoj de la Belartaja Kompanio, magazeno, Hinhua-librejo kaj aliaj. En la antaŭe senhomaj lokoj Daping kaj Janggiaping nun aperas multaj fabrikoj kaj etaĝdomoj. Ankaŭ ambaŭflanke de la stratoj de la kvartalo Ŝapingba aperas multaj etaĝdomoj kaj stratoj kun tute nova fizionomio. Unu tute nova urbeto aperas en la loko de Guan-jinkiaŭ anstataŭ la malnovaj domoj. La plankareo de la nove konstruitaj domoj de Ĉongking en la pasintaj pli ol 20 jaroj estas duoblo de tiu de la malnovaj. Mi informiĝis, ke en la venontaj jaroj oni plie konstruos milionojn da kvadrataj metroj da loĝdomoj.

Antaŭ la Liberiĝo, cirkulis sarkasmaj popoldiroj pri la urba konstruado de Ĉongking, kiaj “tri futojn dikas polvo eĉ sen ventblovado, kaj dum pluvo je koto plenas stratoj”, “en la urbo la du riveroj videblas, tamen trinkakvo mankas”, “aŭtobusoj ofte paneas kaj ilin pasaĝeroj puŝas”. En la jaro 1940, la urbo posedis nur pli ol 20 aŭtobusojn bruligantajn lignan karbon, sed nun jam pli ol 600 trolebusojn kaj aŭtobusojn; la tage provizata tubkonduka akvo pliiĝis de 19,000 tunoj en 1949 ĝis 400,000 tunoj nun (ekskluzive de la akvo uzata de plejparto de fabrikoj); la urbaj kloakoj pliiĝis je 4.9-oblo, la vojlampoj je 27-oblo kaj la areo de asfaltitaj stratoj je 19-oblo.

Tiam neniu fervojo troviĝis en Ĉongking, tial la transportado de varoj kaj pasaĝeroj dependis ĉefe de kelkaj neebenaj ŝoseoj kaj riveroj. Nun la fervojoj Ĉengdu-Ĉongking-a en la okcidento, Siĉuan-Gujĝoŭ-a en la sudo kaj Hiangfan-Ĉongking-a en la oriento kunligis Ĉongking kun aliaj lokoj de la lando. Kaj la lignaj pramoj nun estas anstataŭigitaj per vaporŝipoj. Krome oni konstruis du fervojajn pontojn, ŝosean kaj ferkablan pontojn super la du riveroj. Alia Jangzi-rivera Ŝosea Ponto kun longeco de pli ol 1,000 metroj estas en streĉa konstruado. Nun aviadiloj povas flugi inter Ĉongking kaj aliaj grandaj urboj de la lando, kaj grandaj pasaĝeraj kaj varaj ŝipoj povas atingi Ĉongking ekveturante de Ŝanhajo kaj Vuhan.

INDUSTRIO EN DISVOLVIĜO

Estas ĝojinde, ke la industrio de Ĉongking multe disvolviĝis.

Antaŭe Ĉongking havis nur dekojn da fabrikoj. Post la Liberiĝo oni konstruis kaj pligrandigis pli ol 3,000 fabrikojn. La nuna Ĉongking jam fariĝis granda industria urbo.

Nun la ferŝtala industrio de Ĉongking jam fariĝis nia grava ferŝtala bazo en la sudokcidento. Ankaŭ la afinacia industrio de plurspecaj neferaj kaj raraj metaloj estis konstruita. La novaj 11 modernaj grandaj kaj mezgrandaj ŝaktoj liveras karbon ankaŭ al aliaj provincoj krom la konsumado de la urbo. La novaj grandaj hidro- kaj termoelektraj centraloj, kies produktokvanto pliiĝis je pli-ol-40-oblo, formis grandan elektro- reton de la urbo. La mekanika industrio, kiu antaŭe povis nur ripari simplajn ekipaĵojn, nun produktas kompletojn da ekipaĵoj, plurspecajn precizajn ilmaŝinojn, aŭtojn kaj vaporŝipojn. Ĝia kemia industrio bazita sur kelkaj etaj fabrikoj disvolviĝis en sintezan kemian bazlokon, kiu prenas naturan gason kiel materialon kaj produktas plurspecajn kemiaĵojn. Ĝia totala produktovaloru de 1978 estas pli-ol-260-oblo de tiu de 1949.


La malpeza industrio de Ĉongking havis certan bazon antaŭ la Liberiĝo, sed la specoj de produktaĵoj estis ne tre multaj. Nun ĝi povas produkti milojn da specoj de produktaĵoj, inkluzive de kotonaj, lanaj kaj silkaj teksaĵoj, brakhorloĝoj, kudromaŝinoj kaj plastajoj. Ĝiaj vitraĵoj, ladfruktoj kaj peltaj vestoj ĝuas bonan reputacion sur la internacia merkato. La nova Siĉuan-a Vinilona Fabriko de Ĉongking estas granda moderna entrepreno kaj produktos grandan kvanton da kemifibraĵoj teksaĵoj post sia finkonstruiĝo.

La industrio de elektronaj instrumentoj en Ĉongking estis nove disvolviĝinta en la sesdekaj jaroj. Ĝiaj pli ol 50 fabrikoj de elektronaj instrumentoj produktas poraŭtomatigajn instrumentojn, duonkondukajn integrajn cirkvitojn, laserajn infraruĝajn instrumentojn, determinajn instrumentojn por koloraj televidiloj, mikroondajn instrumentojn ktp. Inter ili troviĝas kompleta ekipaĵo de komputero uzata por industria aŭtomata regado kaj mikroonda dikometro uzata por mezuri dikecon de ŝtalaj materialoj en laminado.

La Ĉongking-a Ferŝtala Kompanio situanta en Dadukoŭ antaŭe estis arsenalo de Kuomintango. Antaŭ sia forkuro, kuomintangaj trupoj ĵetis

Novaj loĝdomoj ĉe Giaŭĉangkoŭ





*Ŝosea ponto super
Jangzi-rivero en
konstruado*

ĝiajn ĉefajn ekipaĵojn en la riveron. Post la Liberigo, laboristoj elakvigis ilin kaj rapide restarigis la produktadon. Post grandskalaj reformado, pligrandigo kaj konstruado ĝi fariĝis kompare kompleta ferŝtala kombinato. Nun la jara ŝtala produktokvanto de la nomita kompanio estas preskaŭ 70-oblo de tiu de 1949 kaj tiu de la ŝtalaj materialoj pliiĝis je pli-ol-120-oblo. Antaŭe ĝi povis produkti nur unu specon de ordinara ŝtalo, sed nun pli ol 200 specojn de ŝtalaj materialoj, inkluzive malalta-alojan ŝtalon.

SUR LA VOJO DE NOVA LONGA MARŜO

Antaŭ kelkaj jaroj, Ĉongking trafis tre grandan subfosadon fare de Lin Biaŭ, precipe de la "kvarpersona bando". Tiam la industria produktado multe malpliiĝis, la sociordo estis malbona, la ĉiutagaj bezonaĵoj kaj manĝaĵoj en vendejoj reduktiĝis rimarkinde. La frakaso de la bando portis al la Ĉongking-a popolo la duan liberigon kaj la monturbo boliĝas denove. Mi estis kortuŝita de la socialisma aktiveco de la Ĉongking-aj laboruloj.

En 1977 Ĉongking plenumis la ŝtatan planon de industria produktado antaŭdate je 58 tagoj, ĝia totala produktovaloro kreskis je 38.3% kompare kun tiu de 1976 kaj superis la plej altan nivelon de tiu en la historio. La totala industria produktovaloro de januaro ĝis septembro en 1978 kreskis je 37% kompare kun tiu de la sama periodo de la antaŭa jaro, kaj la jaraj produktaj taskoj de fero, ŝtalo, ilmaŝinoj, dizeloj, brakhorloĝoj, kudromaŝinoj, kemisterko kaj aliaj sume pli ol 20 specoj de produktaj estis plenumitaj antaŭdate je tri monatoj.

Komence de 1977 la Ĉongking-a Popola Trafika Kompanio malfermis 20 veturliniojn inkluzive de apartaj kaj rektaj linioj kun longeco de 530 km. kaj pliiĝis noktajn aŭtobusojn al iuj ĉefaj linioj. Tiaj noktaj aŭtobusoj haltas laŭ peto de pasaĝero. Multaj vendejoj kaj butikoj de Ĉongking longigis sian servotempon kaj pliiĝis siajn servobjektojn. Antaŭ tagiĝo, la restoracioj ĉu grandaj aŭ malgrandaj kaj manĝaj butikoj jam komencis sian servon, iliaj laboristoj vektortas manĝaĵojn aŭ puŝas ĉaron kun manĝaĵoj al pordoj de fabrikoj, fervoja stacio, doko, hospitaloj kaj strato-kruĉiĝoj por tie vendi matenmanĝon. La hospitaloj praktikas 24-horan servon, kio reduktis al pacientoj gravecon de malsano kaj altigis la pocenton de oficistoj kaj laboristoj kiuj persistas en laborado.

Promenante surstrate, mi trovis, ke en magazenoj vendiĝas diversaj komercaĵoj kaj la socia ordo multe pliboniĝis ol en la tempo de tiranado de la "kvarpersona bando". Emeritoj kaj dommastrinoj, kun ruĝa rubando sur la brako, volonte prizorgas trafikajn ordon. Ĉie, ĉu stratoj aŭ stratetoj, estas purigitaj. La strataj florbedoj bone prizorgataj kun verdaj arboj kaj herboj kaj pompaj floroj allogas preterpaŝantojn kaj plibeligas la monturbon.

En profunda nokto, la aŭtobusoj veturas sur stratoj, la oficistoj kaj laboristoj rapidas al noktoskipoj, la fornofajro de la Ĉongking-a Ferŝtala Kompanio ruĝigas la noktan ĉielon, la sparkoj en veldado sur konstruejoj belas kiel ĉielaj steloj kaj brilas la domegoj de scienca esplorado kaj instruado, ĉio ĉi tio montras, ke la Ĉongking-a popolo plirapidigas siajn paŝojn sur la nova longa marŝo.

Teatra Arto por Infanoj

— POST RIGARDO DE LA TEATRAĴO “ASTERO”

VESPERE de iu sabato, mi rigardis kune kun geknaboj la fabelan dramon “Astero” prezentitan de la Ĉina Infana Arta Teatra Trupo.

Kiam leviĝis la kurteno, aperis antaŭ ni mirinda mondo. Aŭroro rompis la obskuron de nokto, matenruĝo kolorigas la teron kaj la kvietanta montaro fariĝas plena de babilbruo. Birdoj kantas, simieto ĝoje saltadas, panjo Cervo, fratinoj Leporoj kaj aliaj geamikoj en la arbaro kolektiĝis por rigardi floradon de asteroj sur la klifo.

La mirindaj asteroj ekfloras ore disradiante. La asterfloroj, laŭ onidiro, povas feliĉigi homojn diligentajn, kuraĝajn kaj bonkorajn. La juna feo Ma de la arbaro deŝiris unu asteran floron kaj donis ĝin al lia amata diligenta kam-


para junulino Hiaŭlan. Tiu ĉi metis ĝin sur sian kapon kaj deziras feliĉon al la amikoj de la arbaro.

Sed pigra egoisma kaj vanta Dalan enviis sian junan fratinton Hiaŭlan pro ŝia feliĉo. Subinstigate de malica kaj ruza maljuna kato, ŝi defraŭdis la belajn veston kaj orelingojn de Hiaŭlan. La maljuna kato forrabis de Hiaŭlan la asterfloron kaj mortigis ŝin.

La spektatoretoj ĉiuj riproĉis Dalan. Poste sub helpado kaj edukado de la juna feo Ma kaj geamikoj en la arbaro, Dalan konis kaj pentis sian eraron. Ili kune iris kapti la ruzan maljunan katon, kiu kaŝis sin. Kiam la maljuna kato kuris de sur la scenejo, eksplodis krio en la teatro: “La maljuna kato ĉi tie!” “Kaptu ĝin!”



La maljuna kato estas kaptita.



*Juna feo Ma kaj
Hiaŭlan adiaŭas la
geamikojn.*

La maljuna kato estis kaptita kaj la asterfloro reprenita. Ĝojo denove regas en la montoj kaj arbaroj. La magia asterfloro revivigis Hiaŭlan pro petado de la juna feo Ma, kaj Hiaŭlan revenis inter la geamikojn.

La kurteno malrapide falis. La geknaboj varme diskutis kiel distingi belon de malbela, bonon de malbono kaj kiel batali kontraŭ malbonuloj.


La arto de infana teatro estas bela floro de la teatra arto de nia lando. Geknaboj eksterordinare ŝatas ĝin. Dum la pasintaj 30 jaroj, verkistoj de porinfanaj dramoj de nia lando kreis

plurajn eminentajn dramojn. Ekzemple, "Malgrandaj Sovaĝanseroj Ekflugas" pri gejunuloj kiuj amas sciencojn; "Kreskado ĉe la Rivero Janhe" pri geknaboj de revolucia bazloko kiuj fariĝis revoluciaj batalantoj en la periodo de la Liberiga Milito; "Liu Venhjuo" pri malgranda heroo, kiu kuraĝe batalis kontraŭ malbonulo kaj "Ne Kontentiĝu je Cent Poentoj" pri geknaboj, kiuj diligente lernas. Rigardinte tiujn dramojn, iuj geknaboj skribis al la geaktoroj pri siaj sentoj kaj deziroj. En tiuj mallertaj skribaĵoj oni povas vidi, kiel profunde tiuj dramoj impresis la geknabojn.

*Aktorinoj de la teatraĵo "Astero" kun junaj
spektatoroj*



Instruado pri prezenta arto



Geknaboj tre ŝatas Hiaŭlan, la junan feon Ma kaj la simieton en la dramo "Astero". Kvankam la ludantoj estas plenaĝaj, tamen ilia prezentado tre plaĉis al la geknaboj. Lian Deĝi, kiu ludis la rolon de simio, diris al mi, ke ŝi partoprenis en artista trupo kaj fariĝis laboranto de infana teatro kiam ŝi estis ankoraŭ infano. Tiam ŝi estis lerta en ludado de rolo de infano. En la scienca fikcia dramo "Flugo al Stelo" ŝi ludis rolon de petolema frateto, kiu sin kaŝis en kofro kaj estis kunportita de la pliaĝa frato en kosmosipon. Kiam li flugis el la kofro pro sengraviteco, multaj geknaboj-spektantoj ridegis ĝis doloro de la abdomeno.

La aktoroj ne nur ofte legas infanajn legajojn, sed ankaŭ amikiĝis kun infanoj kaj ludas kun ili por observi kaj esplori iliajn psikon, ŝatojn kaj sentimentojn kaj povis sukcese krei figurojn ŝatatajn de infanoj.

Nun, en grandaj urboj de nia lando troviĝas infanaj teatraj trupoj. La Ŝanhaja Infana Teatra Trupo de la Ĉina Bonstatiga Instituto estis plej frue starigita en 1947, subtenate de Vicprezidantino Song Kingling. La Ĉina Infana Arta Teatra Trupo de Pekino estis starigita en 1953, kaj en la unuaj tri jaroj ĝi portis la nomon Infana Teatra Trupo de la Ĉina Junula Arta Teatro. La Liaŭning-a Infana Teatra Trupo de Ŝenjang fondiĝis en 1960 sub zorgado de Ĉefministro Ĝoŭ Enlaj. Krome ankaŭ en Tiangin, Hi-an, Vuhan kaj aliaj grandaj urboj troviĝas infanaj artaj trupoj. De 1976, la Centra Teatra Instituto de Pekino fondis kurson de geknabaj aktoroj. En iu tago, mi vizitis ĝin dum la geknaboj estis lernantaj ludadon. La instruisto sciigis al mi, ke la kurso havas 25 lernantojn, el kiuj la plej juna estas 14-jara kaj la plej aĝa 20-jara. Ili havas altan entuziasmon en lernado. Post trijara lernado, ili laboros en diversaj teatraj trupoj por ludi dramojn por geknaboj.

Mia Familia Vivo


de HIAŬ ĜEN

EN la vivo iam kaj iam aŭdiĝas la opinio, ke virinoj ĉesas progresi post sia edziniĝo kaj ekhavo de infano. Fakte ne ĉiam tiel estas. Ja neniuj sukcesoj de nia afero estas apartigebla de virinoj. Mi tamen ofte min avertas: La familia vivo devas esti bone aranĝita, tamen pli grave estas bone plenumi la laboron.

En la dua jaro post mia enoficiĝo mi edziniĝis al Da-niu post nia interkonatiĝo de du jaroj. Li estas tradukisto kaj mi laboras kiel redaktorino en iu eldonejo de Pekino. Ni amas kaj prizorgas unu la alian kaj kunvivas feliĉe. Nelonge post la edziniĝo mi naskis amindan Pengpeng, kiu alportis novan ĝojon al nia familio. Kompreneble pliiĝis niaj dommastrumaj laboroj pro la familio kaj infano. Por ke ni ne estu ĝenataj de tro multe da tiaj laboroj ni forsendis la kelkmo-

natan fileton al mia patrino, kiu loĝas en suda Ĉinio. Ni reprenis lin al Pekino kiam li fariĝis kvin-jara, kaj li ekvivis en infanĝardeno. Mi kaj mia edzo kuraĝigas kaj helpas unu la alian por kune progresi.

Mi ne multe atentis pri vivaj bagateloj, sed mia edzo estas pli zorgema. Tial en kuna plenumado de la dommastrumaj laboroj ni faris labordividon. Matene mi ellitiĝas antaŭ elkrepuskiĝo kaj haste funkciigas la gasforon. Post mia tualetado la simpla matenmanĝo jam pretiĝas. Matenmanĝinte mi forlasas la hejmon kaj biciklas al la oficejo. Mia edzo zorgas pri purigado kaj ordigado de la ĉambroj kaj tion fininte li iras al la oficejo. Tagmeze ni ambaŭ prenas manĝon en niaj oficejoj. Ĉar Da-niu estas ne tiel lerta kiel mi en kuirado, preparado de ves-



Mia familio

permanĝo ĉiam estas mia tasko, kaj li laboras nur kiel mia helpanto. Ĉiuvespere mi preparas du-tri pladojn kaj unu supon por kio mi bezonas nur 30 minutojn.

Dank' al kuna zorgo pri dommastrumaj laboroj, ni povas elŝpari tempon por aŭskulti preskaŭ ĉiuvespere disaŭdigadon de literaturaj kaj artaj programeroj. Ni jam finaŭskultis la romanojn "Kanto de la Juneco", "Flirtadu la Ruĝa Flago", "Defendi Jan-an" kaj aliajn. Nun ni aŭskultas la ĉinan historian romanon "Li Ziĉeng". Ĉiufoje post aŭskultado, ni kutime diskutas pri la verkoj. Pengpeng elmetis al ni demandojn pri diversaj aferoj kaj ni paciencie ilin eksplikis al li. Post la sepa vespere en la ĉambro regas silento: Da-niu komencas sian tradukadon aŭ legas libron sub la tablolampo; mi lernas Esperanton aŭ legas libron en sofo kaj malgranda Pengpeng plenumas sian hejman taskon aŭ foliumas bildlibrojn en sia ĉambreto. La knabo havas inklinon al pentrarto de sia infaneco kaj ofte pentras ĉevalon, leopardon, pandon, leporon ktp. Nun li estas lernanto de la dua klaso de elementa lernejo kaj ofte faras desegnadon por ĝia murgazeto. Ankaŭ mi tre ĝojas pro tio, ke li pentras sufiĉe bone, kaj senĉese kuraĝigas lin. Vespere de varmega somero ni ofte sidas sur la balkono kaj aŭskultas kantadon, laŭtleĝadon de la knabo, aŭ ekzercas lin en kalkulado, kaj iafoje Da-niu donas rakonton. Niaj ridoj povis aŭdiĝi tre malproksime. . .


Pengpeng estas nia sola filo, nun jam 9-jara. Li estas fortika knabo kaj elstara lernanto. Li malofte devigis nin peti forpermeson pro malsano. Por esti energi plena en laboro kaj studo, mi farigis al mi kontraŭkoncipan operacion en la jarfino de 1975, ĝuste kiam miaj bogepatroj venis de la Nordoriento al Pekino por vidi nin kaj sian filinon. En la komenco ili ne konsentis, ke mi ricevu tian operacion. Mi kaj mia edzo kune klarigis al ili la oportunecon de gepatroj kun malmultaj idoj. Ili rememoris siajn proprajn travivaĵojn en la malnova socio, ke havante 8 gefilojn ili vivis tre malfacile kaj la bopatrino suferis multajn malsanojn kaj fine ili konsentis. Post la operacio mi ripozis unu monaton laŭleĝe. Tiam la bogepatroj transloĝiĝis de sia filino al nia hejmo por flegi min.

Iutage, mi hejmenrevenis kun karpopezo de 2.5 kg. kaj du boteloj da sezamoleo. Vidinte tion Pengpeng ĝoje kriis: "Ha, kiel granda fiŝo!" Li demandis min kie mi akiris la fiŝon. "Estas via avino kiu sendis ĝin al vi." "Kiel bona estas avinjo!" li diris saltetante pro ĝojo. Ni havas bonan rilaton kun la gepatroj. Ili ofte sendas al ni fungojn, orelfungojn, salikokojn kaj aliajn manĝaĵojn, kaj ankaŭ ni sendas al ili bongustajn manĝaĵojn kaj lokajn produktaĵojn de Pekino, kvankam ili ankoraŭ laboras kaj havas sufiĉe multan enspezon. La tri membroj de nia familio havas po pli ol 30 juanojn ĉiumonate por sin vivteni. Ni havas brakhorloĝojn, biciklojn kaj meblaron. Ĉiumonate ni povas deponi sumeton en banko kaj per parto de la ŝparita mono pagi vojaĝkostojn de ni kaj niaj gepatroj en intervizitado.

Mi kaj mia edzo Da-niu esperas, ke Pengpeng, nia sola infano, kreskos sane. Ni komprenas, ke dorlotado ne estas vera amo al la knabo, tial mi neniam neglektis edukadon al li. Tamen, ofte okazas kvereloj inter mi kaj Da-niu pri edukado de la knabo. Mi opinias, ke la knabo devas esti bone edukata tiel por kleriĝo kiel por akiri bonajn kutimojn kaj moralon, dum Daniu asertas, ke sufiĉas se la knabo bone progresas en lernado, kaj ne necesas multe zorgi pri la aliaj flankoj. Foje mi trovis en lia skribilarujo unu plian tranĉileton kaj tuj pridemandis lin, de kie

FANG HJUAN:

Nova Revuo de la Azia Sporto



*La ŝtata sporta
centro de Bankoko*

DE la 9-a ĝis la 20-a de decembro de la pasinta jaro, la 8-a Azia Sporta Konkurso okazis en la Ŝtata Sporta Centro en Bankoko de Tajlando.

Pli ol 2,000 sportistoj de 25 landoj kaj regionoj faris en 12 tagoj 219 disciplinojn de dekelkaj sportobranĉoj. El tiuj sportobranĉoj tabloteniso, hokeo, volano, plonĝo, gimnastiko kaj pafo montris mondan nivelon. El la 8 aziaj sportaj konkursoj tiu ĉi estas la plej grandioza kun plej multaj konkursantoj.

La konkursado iris en 23 lokoj. La ĉefa konkursejo estis la Ŝtata Sporta Centro, kiu povas enteni 50 milojn da rigardantoj. Kvankam la

temperaturo superis 30°C, tamen homamasoj venis al la sportejo kiel tajdoj.

En la intensaj konkursoj oni vidis altiĝon de la tekniko de aziaj sportistoj. Kompare kun la antaŭaj 7 konkursoj, pli multaj landoj gajnis bonajn sukcesojn. Ankaŭ en atletiko kaj naĝo oni gajnis ĝojindajn sukcesojn. 66 rekordoj de atletiko, naĝo, pafo kaj halterlevo de la Aziaj Sportaj Konkursoj estis rompataj kaj iuj el ili proksimiĝis al mondaj rekordoj.

Japanaj gesportistoj gajnis pli multajn orajn medalojn, daŭre konservante la renomon de "Ĉefposedanto de oraj medaloj". La duan kaj trian lokon okupis Ĉinio kaj la Korea Demokratia Popola Respubliko.

li ĝin ricevis. Pengpeng diris, ke kunlernanto ĝin donacis al li. Mi admonis lin: "Redonu ĝin morgaŭ al la kunlernanto. Ne laŭvole prenu donacojn de aliaj. Se vi ion bezonas, diru al mi aŭ via patro kaj ni tion aĉetos por vi." Li kapjesis. De tiam mi ofte kontrolas liajn librosakon kaj poŝojn. Mia edzo tamen diris, ke pri tia bagatelo ne necesas ripeta atentigo. Ni kverelis pro tio. Konsiderante ke nia kverelo antaŭ la okuloj de la knabo malutilas al edukado al li,

ni decidis eviti disputon antaŭ li. Dank' al bona edukado de la lernejo kaj nia prizorgado, Pengpeng rapide progresis en lernado kaj observado de la lerneja disciplino. Iufoje, li hejmenrevenis post lecionoj kaj diris al mi: "Panjo, hodiaŭ mi trovis 50-cendan monbileton survoje kaj ĝin donis al la instruisto." Tuj mi laŭdis lin.

Miaj konatoj ĉiuj diris, ke mi havas feliĉan familion. Fakte tre tre multaj estas tiaj familioj en Ĉinio.

En tiu konkursado la ĉinaj sportistoj observis la principon “unue amikeco kaj due konkurso”, plifirmigis amikecon kun malnovaj amikoj kaj ankaŭ akiris multajn novajn amikojn. En konkursoj ili ĉiuj penis gajni bonajn sukcesojn. Inter la 280 sportistoj de la ĉina delegacio nur 44 partoprenis en la 7-a Azia Sporta Konkurso, kaj la ceteraj estis novicoj. Ili gajnis 56 orajn medalojn, je 23 pli multe ol en la 7-a konkurso. Kaj la atingoj en tabloteniso, gimnastiko, plonĝo, skermo, pafo, atletiko, volano kaj vira korbo-pilko estas pli bonaj. En la konkurso de gimnastiko ĉinaj sportistoj gajnis la ĉampionecon de la vira teamo kaj la virina teamo kaj la tri antaŭajn lokojn de la viraj 6 kaj virinaj 4 individuaj disciplinoj.

Antaŭ la finiĝo de la 8-a Azia Sporta Konkurso, multaj famaj personoj de la azia sporta rondo faris paroladojn. Ili opiniis, ke multe progresis la azia sportado kaj la sukcesoj estas evidentaj, tamen oni devas pli pene lerni unu de alia, lerni avangardan sperton de neaziaj landoj, kaj nur tiel oni povos atingi la mondan nivelon en pli multaj sportaj disciplinoj.

La Azia Sporta Konkurso komenciĝis de 1951 kaj ĝi jam fariĝis simbolo de amikeco kaj solidareco inter la sportistoj kaj popoloj de Azio. De la 5-a Azia Sporta Konkurso Tajlando trifoje estis gastiganto. Dank’ al la klopodado de la registaro, la sporta rondo kaj la popolo de Tajlando, la peniga kaj komplika preparado estis



En la virina gimnastika konkurso de 4 disciplinoj, ĉina sportistino He Hiumin gajnis la ĉampionecon kaj ŝiaj kamaradinoj Liu Jagjun kaj Gu Ĝen kune gajnis la duan lokon.

plenumita en 11 monatoj, kio estis admirata de diverslandaj gastoj.

Dum la 8-a Azia Sporta Konkurso aziaj organizoj de sportobranĉo okazigis kunvenon. La Plenuma Komitato de la Azia Sporta Federacia Konsilantaro decidis, ke la 9-a Azia Sporta Konkurso okazos en Hindio en 1982, kaj cetere ĝi diskutis pri establo de la Plej Alta Azia Sporta Konsilantaro. Tio certe pliprogresigos la azian sportan aferon. En tiuj kunvenoj delegitoj de



La ĉinaj sportistoj eniras la stadionon.

Tajlandaj sportistinoj gratulas la ĉinajn kolegojn.




multaj landoj esprimis subtenon al la restarigo de la leĝa loko de Ĉinio en la Internacia Olimpia Komitato kaj en diversaj internaciaj sportobranĉaj organizoj. Hju Jinseng, la estro de la ĉina delegacio, esprimis al ili koran dankon.

La Sporta Konkurso finiĝis je la 20-a de decembro, en la "Kanto de la Azia Sporta Konkurso". La konkursado finiĝis, sed la amikeco restas. La sportistoj promesis unu al alia revidiĝi en Hindio post kvar jaroj.

LA GAJNINTOJ DE LA ORAJ, ARGĜENTAJ KAJ KUPRAJ MEDALOJ

landoj aŭ regionoj	oraj medaloj	argĝentaj m.	kupraj m.
Japanio	74	64	51
Ĉinio	56	60	51
Korea Demokratia Popola Respubliko	21	15	22
Suda Koreio	20	22	30
Tajlando	11	12	19
Hindio	11	11	5
Indonezio	7	8	18
Pakistano	4	4	11
Filipinoj	4	4	6
Irako	3	7	9
Libano	3	2	1
Singaporo	2	1	4
Malajzio	2	1	3
Sirio	2	0	1
Mongolio	1	3	5
Birmo	0	3	4
Hongkong	0	2	3
Srilanko	0	0	2
Kuvajto	0	0	1



Profunda Amikeco

de HINHUA

Ĉinio kaj Usono rigardas unu la alian trans Pacifiko. En la lasta duono de la 18-a jarcento, nome en la komenca periodo post la fondiĝo de Usono, jam ekkontaktis reciproke la popoloj de niaj du landoj.

En la jaro 1783 finiĝis la usona sendependa milito. Post sia duon-jara veturado, la unua usona ŝipo "Ĉina Reĝino" atingis Kantonon je la 28-a de aŭgusto, 1784. Tiel malfermiĝis la komerca rilato inter Ĉinio kaj Usono. Tiam Usono, plene suferinta blokadon de la britaj koloniistoj, havis nur 13 ŝtatojn

kaj malfortan ekonomian bazon. En la komercado de la du landoj Ĉinio favoris Usonon ne nur per livero de fremda valuto al ĝi, sed ankaŭ per eksporto de varoj bezonataj de la usona popolo.

Kun disvolviĝo de la komerco inter Ĉinio kaj Usono ĉiam plimultiĝis interkontaktoj de diversrondaj personoj de la du landoj. Depost la tridekaj jaroj de la 19-a jarcento kreskis la kultura interŝanĝo inkluzive tradukadon kaj eldonadon de libroj de ambaŭ landoj pri politiko,

ekonomio, historio, kulturo, moroj, kutimoj k. a. por konigi ilin al la du popoloj.

En la mezo de la 19-a jarcento, Usono estis ankoraŭ nove leviĝanta lando kun vasta teritorio kaj malgranda loĝantaro. Tiam Usono faris grandskalan ekspluatadon al la vasta okcidenta parto, trovis riĉan orminon en Kalifornio kaj instalas la fervojojn de Atlantiko ĝis Pacifiko. En la jaro 1848, ĉinoj komencis elmigri al Usono kaj faris sian kontribuon en disvolvado de okci-

La 25-an de dec. 1964, Ĉefministro Ĝoŭ Enlaj, Deng Jingĉaŭ kaj Ĉen Ji ĉeestis festenon por celebri la 79-an datrevenon de la naskiĝtago de A. L. Strong.





Vicprezidantino Sung Kingling akceptas usonan verkiston E. Snow.

denta Usono kune kun la vasta popolo de tiu lando. Tiuj ĉinoj estis laboremaj kaj kuraĝaj, kaj amikiĝis kun la usona laboranta popolo en longa kunvivado. La fame konata urbo San-Francisko estis konstruita kune de usonaj laboruloj kaj ĉinaj elmigrintoj en la plej frua periodo.

S-ro Sun Jatsen, la granda pioniro de la ĉina revolucio, plurfoje vizitis Usonon en preparado por la Revolucio de 1911. Estis Havajo kie li organizis la unuan revolucionan societeton Hingĝonghuj. Liaj revolucionaj aktivadoj ricevis fortan subtenon de la diversrondaj personoj de Usono kaj patriotaj ĉinaj elmigrintoj.

La usona popolo dekomence donis sian profundan simpatian kaj subtenon al la popola revolucio gvidata de la Komunista Partio de Ĉinio. Nemalmultaj sinceraj amikoj de la ĉina popolo inkluzive de Edgar Snow, Agnes Smedley kaj Anna Louise Strong faris neforgeblajn kontribuojn en subtenado de la ĉina revolucio kaj plifortigado de la amikeco inter la ĉina kaj usona popoloj. Iliaj verkoj priskribantaj batalojn de la ĉina revolucio, ekz., «Ruĝa Stelo super Ĉinio»,

La ĉina ĵurnalista delegacio en Usono



estas plej bonaj atestoj pri la revolucia amikeco inter la ĉina kaj usona popoloj. Laŭ iliaj testamentoj, iliaj cindroj estis enterigitaj en Ĉinio. La ĉina popolo neniam forgesos la amikecon kaj fratecon de la usona popolo reprezentata de ili.

Post la fondiĝo de la nova Ĉinio, la ŝtata rilato inter Ĉinio kaj Usono trairis longan zigzagan vojon, kaj la kontakto inter iliaj popoloj interrompiĝis pli ol 20 jarojn. En la fino de la sesdekaj jaroj kaj la komenco de la sepdekaj jaroj okazis granda ŝanĝo en la ekvilibro de

la politikaj fortoj de la mondo. Konsiderante la tutecon de la internacia kontraŭhegemonia batalo, Prezidanto Maŭ Zedong kaj Ĉefministro Ĝoŭ Enlaj faris strategian decidon malfermi la interrilatan pordon inter Ĉinio kaj Usono. En la jaro 1972 usona Prezidanto Nixon vizitis Ĉinion, faris seriozan kaj malkaŝeman diskutadon kun Prezidanto Maŭ kaj Ĉefministro Ĝoŭ pri la rilatoj inter niaj du landoj kaj pri internaciaj aferoj, kaj poste Ĉinio kaj Usono publikigis la Komunan Komunikon de Ŝanhajo



En oktobro de 1978, Vicĉefministro Vang Ĝen intervidiĝis kun la verkinto de "Ruĝa Stelo super Ĉinio" (Daŭrigo) S-ino Nym Wales.



Ĉina kaj usona sportistinoj

kaj tiel malfermis novan situacion de la rilatoj inter Ĉinio kaj Usono. Depost tiam plimultiĝis, jaron post jaro, reciprokaj vizitoj de diversron-daj personoj kaj organizoj de la du landoj kaj ankaŭ interŝanĝoj en scienco, tekniko, kulturo, eduko kaj komerco.

Dank' al kuna klopodado de la gvidantoj, registaroj kaj popoloj de la du landoj, la rilato inter Ĉinio kaj Usono fine normaliĝis. Tio malfermis vastan perspektivon al disvolvo de la amikeco inter la ĉina kaj usona popoloj kaj interŝanĝoj inter niaj du landoj en ĉiuj kampoj.

Fine realiĝis la espero

de JAU SIMOU

Okaze de la normaliĝo de la diplomatia rilato inter Ĉinio kaj Usono, ni ĝoje rememoris pri la tagoj, kiujn ni pasigis en Usono.

En la lastaj septembro kaj oktobro ni vizitis Usonon kune kun la Geografa Delegacio de la Ĉina Akademio de Sciencoj. Dum preskaŭ 40 tagoj ni vizitis 23 urbojn kaj pri-rigardis multajn universitatojn, sciencajn instituciojn, fabrikojn, entreprenojn kaj vilaĝojn. Neforge-sebla estas la profunda amikeco montrita de la usonaj popolo kaj sciencistoj al la ĉinaj popolo kaj sciencistoj.

Ni ankoraŭ tenas en la memoro Vicprezidanton Johnson de la Usona-Ĉina Amika Asocio de Colorado de mezokcidenta Usono kaj aliajn amikojn. Johnson estas profesia ŝoforo de fabriko kaj iam vizitis Ĉinion. Kvankam li estis tre okupata, tamen li faris multajn klopodojn por pliigi la amikecon inter la ĉina kaj usona popoloj. En la jaro 1961, lia patro kiel parlamentano aprobis restarigon de la leĝa sidloko de Ĉinio en UNO kaj aktive pledis por starigi normalan diplomatian rilaton inter Usono kaj Ĉinio. Kiam ni venis al la ŝtato, li sentis apartan ĝojon. En festeno li laŭdis la ĉinan popolon, ke ĝi sub la gvido de la Komunista Partio de Ĉinio estrata de Prezidanto Hua Guofeng frakasis la “kvarpersonan bandon”, kaj la planon pri modernigo de industrio, agrikulturo, nacidefendo kaj scienco kaj tekniko en la kuranta jarcento. Li diris, ke Ĉinio nun klopodas por konstrui sin en modernan potencon, kaj ludos grandan rolon por paca kaj progresiva afero de la mondo. Post la festeno multaj usonaj amikoj kantis «Mi Amas Tian-anmen de Pekino» en la ĉina lingvo, por esprimi sian amikecon al la ĉina popolo.

Ni krome vizitis la Michigan-an Universitaton. En la sama vespero en kiu ni atingis tiun lokon, la rektoro de la universitato regalis nin per festeno, kaj ĝin ĉeestis pli ol 100 diversrondaj personoj. Pluraj amikoj varme invitis nin gastis en ilia hejmo. Kiam ni gastis en la hejmo de dekano de la geografia fakultato de la universitato, liaj edzino kaj patrino mem preparis manĝaĵojn por regali nin. La mastro diris: “Estas honoro por mia tuta familio akcepti ĉivespere la ĉinajn gastojn en mia hejmo. Tia signifohava renkontiĝo estos nemal-



Usona specialistino en Pekino

ofta post la normaligo de la diplomatia rilato inter Usono kaj Ĉinio. Normaligo de la rilato inter niaj du landoj estas nia komuna deziro. Mi esperas, ke nia universitato povos kulturi ĉinajn studentojn kaj esplorantojn.”

Akompanate de usonaj amikoj nia delegacio pririgardis la plej grandan riveron Misisipon de Usono. La rivero fluas kiel bunta rubando de nordo al sudo tra la vastatero. Ĝia torento kiel lakto nutras la usonan popolon ĉe ambaŭ bordoj. En jakto ni ĝoje interparoladis kun usonaj amikoj kaj aprecio ĉirkaŭajn verdaĵojn. Ni lernis de la usonaj amikoj utilan sperton pri ordigado de rivero.

En la estonteco la amika interkontakto de la ĉina kaj usona popoloj fluos senĉese kiel la riveroj Misisipo kaj Jangzi. Nun jam stariĝis la diplomatia rilato inter Ĉinio kaj Usono, kaj realiĝis finfine la deziro de la du popoloj.

Usona Sekvojo en Ĉinio

de LU GIA

En frua printempo de 1972, arĝenta aviadilo Boein G alportis usonan sekvojon kun alteco de unu metro de Kalifornio al la pitoreska urbo Hangĝou de nia lando, trans la ondanta Pacifiko. Ĝi estis valora donacaĵo de la usona eksprezidanto Nixon por esprimi amikecon de la usona popolo al la ĉina popolo, kaj plantiĝis en la Hangĝou-a Botanika Ĝardeno ĉe la Okcidenta Lago.


Rapide forpasis ses jaroj, plenaj je politikaj eventoj. Sur ekrano de televidiloj oni jam vidis la ĝojigan scenon, ke Kamarado Hua Guofeng solene deklaris la oficialan stariĝon de diplomatia rilato inter Ĉinio kaj Usono. Nun, vidante la rektan sek-

vojon inter diversaj arboj, oni kva-
zaŭ vidas, ke la amikeco inter la
popoloj de Ĉinio kaj Usono prospe-
ras same kiel tiu arbo kun pompaj
branĉoj kaj folioj.

Sekvojo estas genro de gigantaj
pinglaj arboj specialaj de Kalifor-
nio. Ĝi estas unu el la longvivaj
kaj altaj plantaĵoj en la mondo. La
ligno de sekvojo estas tre valora,
ĉar ĝi estas malmola kaj solida,
facile prilaborebla kaj taŭga por
fari belajn meblojn. Dank' al dili-
genta kulturado de Hangĝoŭ-aj hor-
tikulturistoj dum ses jaroj, la sek-
vojo jam havas pli ol ses mil idojn.
Nun ili estis transplantitaj jam en
pli ol 20 urboj de nia lando.

En la festeno por bonvenigi eks-
prezidanton Nixon en februaro de
1976, Kamarado Hua Guofeng diris:
“La sekvojo prospere kreskas, ĝi
simbolas novan disvolviĝon de la
amikeco inter la ĉina kaj usona
popoloj.” Al tiu arbo Prezidanto
Maŭ Zedong kaj Ĉefministro Ĝoŭ
Enlaj donis sian zorgon. Multaj
usonaj amikoj venintaj al nia lando,
inkluzive la filinon de Nixon kaj
ŝian edzon, pririgardis la arbon,
kiam ili vizitis la urbon Hangĝoŭ.

La usona sekvojo kreskas kaj ge-
neras sur la vasta tero de Ĉinio,
kaj la amikaj vizitoj de la dulandaj
popolanoj pliiĝas ĉiutage. Ni kre-
das, ke tiu amikeco senĉese disvol-
viĝos, kiel tiu sekvojo, sub diligenta
flegado de la du popoloj, post la
stariĝo de la diplomatia rilato inter
Ĉinio kaj Usono.



En Pekino

LIULIĈANG kun longeco de 750
metroj estas antikva strateto
ekster la pordego Hepingmen de
Pekino. Ĝi famiĝis pro vendado
de valoraj malnovaj libroj, kaligra-
fajoj, pentraĵoj, kopioj de manskri-
bajoj gravuritaj sur antikvaj me-
morŝtonoj, ŝtonaj inkujoj, penikoj
kaj ĉinaj inkpecoj kaj estis nomata
kiel kultura strato de Pekino. Mul-
taj fremdlandaj vizitantoj kaj tu-
ristoj ŝatis iri tien por aĉeti ion.

Liuliĉang havas sufiĉe longan
historion. Frue en Liaŭ-dinastio
(916 — 1125 p. K.) tie jam aperis
vilaĝo. En Juan-dinastio (1271 —
1368 p. K.) kaj Ming-dinastio
(1368 — 1644) tie funkciis ŝtata
bakejo de glazuritaj ceramikaĵoj.
Plejparto de la glazuritaj cerami-
kajoj bezonataj en konstruado de
palacoj estis produktitaj ĉi tie. Kaj
pro tio la loko ricevis la nomon
Liuliĉang Esp-e: bakejo de glazu-
ritaj ceramikaĵoj.

La kultura strato formiĝis eble en
la regperiodo de Kanghi (1662—1722)
de King-dinastio. Tiam konstruiĝis
tie multaj dometoj, aperis malgran-
da strato kaj foiro kaj formiĝis loĝ-
kvartalo. En la posta periodo de
Kanghi ĉiujare tie okazis foiro en
pluraj tagoj, en kiu ne nur vendiĝis
diversaj vivbezonaĵoj, sed ankaŭ
kolportiĝis libroj. Poste librejoj

Liuliĉang-Anti- kva Kultura Strato

de SUN HJEHAJ
kaj SONG TIBING

anstataŭis la surstratajn librostan-
dojn. Tiutempe mandarenoj-erudi-
ciuloj en Pekino ŝatis loĝi ĉirkaŭ
Liuliĉang por povi facile aĉeti li-
brojn. Kaj tio akcelis disvolviĝon
de tiea librovendado. En la 38-a
jaro de Kianlong (1773), la kortego
intencis kompili enciklopedion kaj
devis kolekti grandan kvanton da
ĉinaj libroj. La kortego kolektis
librojn ne nur de libroamatoroj sed
ankaŭ pere de librovendistoj. Tio
plie akcelis la librovendadon de
Liuliĉang kaj venigis al ĝi plej pros-
peran tempon. Samtempe kun tio
ekfunkciis unu post alia sur la strato
butikoj de antikvaj metiartaĵoj kaj
skribiloj, prilaborejoj de pentraĵoj
kaj presejoj de leterpaperoj kun
lignogravuraj bildoj k.a.

Normale disvolviĝis la nomita
kultura strato kun librovendado
kiel sia ĉefa komerco dum pli ol
cent jaroj ekde la regperiodo de
Kianlong (1736 — 1795). Plejparto
de la elstaraj kleruloj de King-
dinastio havis rilatojn kun tieaj
librovendejoj. Sed ekde la Opia
Milito en 1840, Liuliĉang estis mult-
foje tretita de imperiistoj, kiuj in-
vadis Pekinon. Multego da valoraj
klasikaj libroj, raraj kaligrafajoj kaj
pentraĵoj, bronzaĵoj el dinastioj
Ŝang (16 — 11-a jarcento a. K.) kaj
Ĝoŭ (11-a jarcento — 770-a jaro
a. K.) estis forrabitaj eksterlanden.



En butiko de artaĵoj

Dum la reakcia regado de Kuomintang la vendejoj de malnovaj libroj agoniis pro inflacio, kaj granda kvanto da libroj estis venditaj laŭ pezo. Post la liberiĝo de Pekino en 1949, la antikva kultura strato akiris novan vivon.

En la unuaj jaroj post la Liberiĝo restis en Liuliĉang pli ol 170 kulturaj butikoj, kiuj konservis sian originalan stilon. Subtenate de la ŝtato, la komerco de tiuj butikoj iom disvolviĝis. Ili aktive kolektadis historiajn kulturaĵojn kaj kla-

sikajn librojn, liveris grandan kvanton da sciencaj materialoj por ŝtataj muzeoj, sciencaj kaj esploraj institutoj kaj altaj lernejoj kaj ankaŭ kontribuis al interŝanĝo de ĉina kaj eksterlandaj kulturoj. Estis bedaŭrinde, ke antaŭ kelkaj jaroj Liuliĉang suferis katastrofon pro la kultura diktaturo de Lin Biaŭ kaj la "kvarpersona bando", kaj restis nur kelkaj kulturaj butikoj de originala koloro.

Lastatempe la Kultura Ministerio de Ĉinio fondis specialan organizon por restarigo kaj konstruado de la strato. Laŭ la plano la strato kun larĝeco de 15 metroj tralazos nur piedirantojn, kaj ambaŭflanke de ĝi konstruiĝos domoj de antikva tradicia stilo, restariĝos malnovaj butikoj, funkciigos en sidloko de la malnova templo domo de historiaj materialoj de Liuliĉang kaj ekspoziciejo de klasikaj kaligrafiaĵoj kaj pentraĵoj kaj trezoraĵoj. Oni povas diri, ke post nelonga tempo la malnova kultura strato certe prezentiĝos antaŭ ni per pli plaĉa aspekto.



Angulo de la kultura strato



Antaŭ Alveno de Nova Periodo de la Ĉina Revolucio

de ŜI GIN

LA ĉina moderna historio komenciĝis per la Opia Milito en 1840 kaj finiĝis je la antaŭvespero de la Movado de la Kvara de Majo en 1919. En tiu periodo Ĉinio troviĝis en malluma regado de la nordaj militaristoj, kaj la popolo vivis en teruraj suferoj. Kvankam D-ro Sun Jatsen ankoraŭ persistis en batalo, tamen li multfoje malsukcesis kaj dronis en malespero. Sed, tiam la laborista klaso de Ĉinio fortiĝis, nova kultura movado leviĝis kaj krome marksismo-leninismo komencis disvastiĝi en Ĉinio, tial la ĉina revolucio post la Movado de la Kvara de Majo eniris novan periodon.

Post la morto de Juan Ŝikaj en junio de 1916, vicprezidanto Li Juanhong prezidantiĝis, kaj Duan Kijuj, ĉefministro de la kabineto, kaptis la efektivan povon de la Pekina Registaro. La regpotenco de Duan Kijuj tamen jam ne estis unuigita kontraŭevolucia regpotenco de la lando. Pro intensa interbatalo de imperiismoj por interesoj kaj pro la natura ekonomio de memsufiĉeco, aperis en Ĉinio la situacio de separatismo kaj interbatalado de grandaj kaj malgrandaj militaristoj. La norda militaristaro

kun Juan Ŝikaj kiel ĝia ĉefo splitiĝis en la du klikojn de Ĝili kaj Anhuj. La unua kun Feng Guoĝang (poste Caŭ Kun kaj Vu Pejfu) kiel ĉefo, subtenate de Britio kaj Usono, efektivigis sian regadon super la provincoj Hubej, Gianghi, Giangsu k. a. en la meza kaj malsupra baseno de Jangzi-rivero. La dua kun Duan Kijuj kiel ĉefo, subtenate de Japanio, tenis la Pekinan Registaron en sia mano kaj aŭtoritatecon super la provincoj Anhuj, Ŝandong, Ĝegiang k.a. La kliko de Fengtian kun alia japana agento Ĝang Zuolin kiel la ĉefo, regis la

tri provincojn de nordorienta Ĉinio. En la provincoj de sudokcidenta Ĉinio troviĝis la militaristaj klikoj de Guanghi kaj Junnan, kaj krome estis malgrandaj militaristoj, kiuj tenis unu provincon aŭ unu lokon sub sia regado. Tiuj militaristoj terure subpremis kaj ekspluatis la popolon, kaj militadis unu kontraŭ alia.

Duan Kijuj heredis la reakcian politikon de Juan Ŝikaj, tenis en siaj manoj la militan kaj registaran povon kaj praktikis diktaturon. En junio kaj julio de 1917, reakcia mi-

La gazeto "Nova Junularo"



litaristo Ĝang Hjun forpelis, agitate de li, prezidanton Li Juanhong, kiu havis kontraŭdirojn kun Duan, kaj restaŭris la eksimperiestron Puji. Sub forta opono de la tutlanda popolo, Duan transprenis la kontraŭrestaŭran flagon kaj likvidis la restaŭron; li refunkciis kiel ĉefministro kaj Feng Guoĝang fariĝis aganta prezidanto. De post tiam Duan Kijuj agadis ankoraŭ pli arbitre kaj senskrupule nuligis la provizoran konstitucion kaj parlamenton. Lia naciperfido eĉ superis tiun de Juan Sikaj. En aŭgusto de 1917, li deklaris militon kontraŭ Germanio. Tuj poste li prunteprenis grandan sumon de Japanio kaj organizis la t. n. militpartoprenantan armeon fakte por ekspansiigi la forton de sia kliko de Anhuj, pretekstante pri partopreno en la milito. Por akiri grandan sumon da mono Duan Kijuj vendis al Japanio posedantecon kaj interesojn de fervojoj, minejoj kaj arbaroj en la Nordoriento kaj Interna Mongolio, kaj agnoskis, ke Japanio heredis la privilegion de Germanio en Ŝandong. Krome li subskribis "militan interkonsenton" kun Japanio por oponi kontraŭ la rusa Oktobra Revolucio, permesis al ĝi starigi garnizonon en Ĉinio, vendis al ĝi nacidefendajn sekretojn kaj donis al ĝi la rajton trejni kaj komandi ĉinan armeon. La naciperfido kaj diktaturo de Duan Kijuj renkontis fortan oponon de la tuta lando.

Sun Jatsen rigardis la provizoran konstitucion kaj parlamenton kiel simbolon de respubliko, tial li alvokis al la lando por subteni kaj restarigi ilin. Por teni kaj plivas-tigi siajn okupitajn terenojn, ankaŭ la militaristaj klikoj de Guanghi kaj Junnan faris subtenan eĥon. En julio de 1917 Sun Jatsen gvidis militŝiparon kaj parton de la parlamentanoj por veturi de Ŝanhajo al Kantono kaj tie levis la flagon

de "protektado de la provizora konstitucio". En aŭgusto, tiuj parlamentanoj okazigis eksterordinaran kunvenon de la parlamento kaj elektis Sun Jatsen kiel marŝalon. En septembro fondiĝis milita registaro gvidata de Sun Jatsen por protekti la konstitucion. Tiu aktivado de Sun Jatsen por oponi kontraŭ la nordaj militaristoj estis prava, sed ĝia malsukceso estis neevitebla pro tio, ke li sin apogis sur lokaj militaristoj anstataŭ sur la popolo.

La movado por protekti la konstitucion vekis eĉ Duan Kijuj teruron kaj malamon. Sin apogante sur sia supera milita forto kaj japana subteno li obstine praktikis la politikon "unuigi la landon perforte". En oktobro de 1917, li sendis tru-pojn suden kaj faris enlandan militon en sudokcidenta Ĉinio. Sed, la kliko de Ĝili kun Feng Guoĝang (la tiama aganta prezidanto) kiel reprezentanto en la Pekina Registaro havis kontraŭdirojn kun la kliko de Anhuj kaj pledis por "unuigi la landon pace", kio multe malhelpis al Duan efektiviigi la planon. Pro tio, la milito daŭris pli ol du jarojn.

Samtempe kun tio, ankaŭ leviĝis akraj kontraŭdiroj en la suda milita registaro. La sudokcidentaj militaristoj ne nur ne vere subtenis la movadon de Sun Jatsen, sed eĉ ĉiamaniere metis obstaklojn sur la vojon. En majo de 1918, ili direktis parton de la membroj de la eksterordinara parlamento reorganizi la militan registaron, nuligis la marŝalan sistemon kaj starigis politikan prezidantaron el sep membroj por ekskluzivi Sun Jatsen. D-ro Sun estis devigita rezigni sian marŝalecon kaj revenis al Ŝanhajo. Per tio fiaskis la movado de protektado de la konstitucio.

Retrorigardinte la plurajn malvenkojn post la Revolucio de 1911,

Sun Jatsen sentis la koron peza kaj troviĝis en izoliteco kaj senelireja situacio. La historio montris, ke la ĉina burĝa revoluciularo, reprezentata de Sun Jatsen, ne povis plenumi la gravan taskon gvidi la ĉinan revolucion, kaj la glora misio gvidi la demokratian revolucion de Ĉinio historie falis sur la ŝultrojn de la laborista klaso de Ĉinio.

En tiu tempo la laborista klaso de Ĉinio jam fortiĝis iom post iom, ĉar la nacia industrio de Ĉinio, eĉfe la tekstila kaj faruna industrioj, havigis al si la ŝancon disvolviĝi pro tio, ke la potencoj Britio, Rusio, Germanio kaj aliaj estis okupitaj de la Unua Mondmilito kaj malstreĉis sian subpremadon al Ĉinio. Kun disvolviĝo de la nacia kapitalismo de Ĉinio kaj plimultiĝo de la kapitalo investita de Japanio, Usono kaj aliaj landoj en Ĉinio, la nombro de la ĉinaj laboristoj rapide kreskis de 500,000-600,000 antaŭ la Revolucio de 1911 ĝis 2,000,000 en 1919. Kaj tiu de la metiistoj kaj komizoj superis 10,000,000. Kvankam la industriaj laboristoj konsistigis nur malgrandan parton de la tuta loĝantaro, tamen ili formis la plej pro-preseman kaj revolucion klason. Ili estis malsamaj ol la kamparanoj, ĉar ili loĝis koncentre en grandaj urboj kaj kolektive laboris per maŝinoj en fabrikoj. Ili reprezentis novajn produktajn fortojn. Ili estis ankaŭ malsamaj ol la burĝoj pro tio, ke ili suferis trioblan subpremadon de imperiismo, feŭdismo kaj kapitalismo, sin trovis en malalta ekonomia pozicio kaj havis nenian rajton en politiko, tial ili montris plej firman sintenon al revolucio. Ĝuste pro tio la laborista movado vigle disvolviĝis dum kreskado de la laboristaro. Laŭ statistiko, en la periodo de 1912-1919 okazis pli ol 130 strikoj kun ĉiam pli granda nombro de partoprenantoj kaj en

ĉiam pli grandaj skalo kaj batalintenseco. La ĉina laboristaro faris ne nur ekonomian strikon, sed ankaŭ politikan batalon kontraŭ imperiismo kaj militaristoj. Ekz., pli ol 1,700 ĉinaj laboristoj kaj oficistoj de la fabrikoj kaj vendejoj funkciigataj per franca kapitalo en koncesiita kvartalo okazigis strikon kontraŭ Francio, kiu perforte okupis Laŭhikaj de la urbo Tiangin per trupo en oktobro de 1916 por plivastigi sian koncesiitan teritorion. Tiu striko, subtenate de la tuta Ĉinio, daŭris duonjaron kaj fine devigis Francion rezigni la elmetitajn postulojn. Tiam la laborista klaso de Ĉinio kun altiĝanta konscio iris memfide al la nova periodo de la ĉina revolucio.

En tiu periodo, la ĉina popolo levis ankaŭ grandskalan novan kulturenan movadon. En septembro de 1915 eldoniĝis, en Ŝanhajo, «Junula Gazeto» redaktata de radikala demokratio Ĉen Duhiu. En la dua jaro ĝi alinomiĝis «Nova Junularo» kaj ĝia redakcio translokiĝis al Pekino. Li Daĝaŭ kaj Lusin, kiuj instruis en la Pekina Universitato, farigis ĉefaj kontribuantoj de tiu revuo. La nova kultura movado vigle disvolviĝis en Pekino.

La movado ĉefe pledis por demokratio kaj scienco. La batalantoj de la movado opiniis, ke post la Revolucio de 1911 en Ĉinio ankoraŭ ne stariĝis vera demokratia reĝimo, kaj la demokratio de la Okcidento devas esti energie propagandata. Ili draste kritikis la diktaturan reĝimon. Li Daĝaŭ montris: “Tiel demokratio kaj monarkio kiel libereco kaj absolutismo ja ne povas kunekzisti samtempe. La vivado de

monarko signifas morton de la popolo, kaj la ekzisto de absolutismo signifas pereon de libereco.” Krome ili propagandis sciencon kaj ateismon por oponi kontraŭ superstiĉo kaj postĝinta ideologio.

La nova kultura movado rapide direktis sian lancpinton al konfucianismo, kiu defendas la feŭdisman absolutismon kaj pledas por feŭdismaj etika kodo kaj moralo. Oni elmetis la sloganon “For Konfucio-butikon!” Lusin sturmis ĉe la plejfronto. En sia novelo «La Taglibro de Frenezulo» li indigne montris, ke post la vortoj “humaneco, justo, moralo kaj virto”, sin trovas fakte du ideografiaj “hom-manĝo”. En la revuo «Nova Junularo» oni kritikis la malnovan etikan kodon kaj samtempe faris diskutadon pri la problemo de liberigo de virinoj kaj propagandis rajtegalecon inter viroj kaj virinoj kaj personan liberecon.

Kun la disvolviĝo de la nova kultura movado «Nova Junularo» elmetis la sloganon “por la parola lingvo, kontraŭ la klasika lingvo” kaj “por la nova literaturo, kontraŭ la malnova literaturo”. Tio donis grandan influon en la batalo kontraŭ la feŭdisma kulturo.

La nova kultura movado antaŭ la Movado de la Kvara de Majo estis intensa batalo de la ĉina burĝa kulturo kontraŭ la feŭdisma kulturo. Kvankam en la movado troviĝis seriozaj mankoj, tamen ĝi forte rompis la feŭdisman kaĝon kaj akcelis vekigon de la popolo, tiel ke multaj homoj ankoraŭ pli energie klopodis por trovi la veron por savi la nacion kaj popolon. Ĉio ĉi tio kreis kondiĉojn por disvastigi marksismon-leninismon en Ĉinio. Ĝuste

pro tio, novaĵo pri la venko de la Oktobra Revolucio gvidata de Lenin en Rusio jam aperis en la ĉinaj ĵurnaloj nur tri tagojn post la eksplodo de tiu revolucio. Sub influo kaj kuraĝigo de tiu revolucio la ĉinaj progresemluloj komencis propagandi ĝin, studis kaj disvastigis marksismon-leninismon. En julio de 1918, Li Daĝaŭ publikigis sian artikolon «Komparo de la Franca Revolucio kun la Rusa», kiu montris la socialisman karakteron de la Oktobra Revolucio kaj alvokis la ĉinan popolon sin pretigi por la nova revolucia tajdo. En novembro li ree aperigis artikolojn «Venko de la Popolo» kaj «Venko de Bolŝevismo», varme aklamante: “Celebru la novan aŭroron de la homaro.” Krome li publikigis alian gravan artikolon «Junularo kaj la Kampano», dirante, ke la “intelektuloj kaj la laborista klaso nepre devas kombiniĝi” kaj alvokante por disvolvi la revolucionan movadon de laboristoj kaj kampanoj de Ĉinio.

La disvastiĝo de marksismo-leninismo kaj ĝia kombiniĝo kun la laborista movado ebligis al la ĉina laborista klaso ekkoni sian historian mision kaj sin turni de klaso “en si mem” en klason “por si mem”. En 1919 okazis la Movado de la Kvara de Majo kaj la laborista klaso de Ĉinio kiel konscia sendependa politika forto suriris la politikan scenejon. En 1921 naskiĝis la granda Komunista Partio de Ĉinio, kaj tiel la ĉina revolucio transiris de la malnov-demokratia revolucio gvidata de la burĝaro en la novdemokratian revolucion gvidatan de la proletaro. De tiam komenciĝis la granda nova ĉapitro de la nuntempa historio de Ĉinio.



Kuriozaj Gajloj


de NIANZI

En la profunda montaro de la okcidenta parto de Hunan-provinco kreskas flavverdaj arboj, sur kies branĉoj troviĝas densaj helkoloraj "fruktoj", kiuj estas efektive gajloj.

Krom en vintro, preskaŭ tutjare oni povas vidi sur branĉoj de tiuj arboj gajlojn kun formoj de trapofrukto, ovo kaj spindelo. Multaj homoj erare rigardis ilin kiel fruktojn. Sed fakte ili estas histoŝvelaĵoj kaŭzitaĵoj de afidoj sur sumako k.s. arboj. En aŭtuno, tiaj afidoj flugas el gajloj kaj parazitadas sur iaj hepatikoj kaj naskas afididojn per partenogenezo. La afididoj suĉas la sukcon de hepatikoj kaj faras blankan vaksan kokonon por travintri. En printempo de la sekvanta jaro iliaj krizalidoj fariĝas flugilhavaj femalaj afidoj. La afidoj flugas sur sumakojn kaj aliajn vegetalojn kaj naskas senflugilajn masklajn kaj femalajn idojn. Post pariĝo la femalaj naskas senflugilajn femalajn insektojn, kiuj suĉas sukcon de junaj folioj de sumakoj kaj aliaj vegetaloj, ekscitas la histon de la folioj, kaj la folioj pli kaj pli ŝveliĝas kaj fine fariĝis gajloj. Dum tiu tempo la femalaj afidoj multe reproduktas per partenogenezo. Meznombro ĉiu gajlo entenas 4,000 afididojn. Tiuj idoj transfor-

miĝis en flugilhavajn femalajn afidojn kaj elflugas el la gajloj. En aŭtuno, gajloj balanciĝas en vento, kaj svarmoj da afidoj ŝvebas en arbaro. Vere mirinda spektaklo.

Gajloj de Ĉinio havas bonan renomon en kaj ekster la lando. Ĉinio liveras grandan kvanton da bonkvalitaj gajloj. Oni deplukas gajlojn en somero kaj aŭtuno, tremas ilin en bolanta akvo 3-5 minutojn por mortigi la afidojn en la gajloj kaj poste sekigas ilin per sunumo aŭ bako. Kemia analizo montras, ke gajlo entenas multajn utilajn substancojn, el kiuj 50-70% estas tanacido. La esenco de gajlo povas kuraci lakson, malsanan ŝvitadon, sangadon, disenterion, hidropson, sangan hemoroidon, uteroptozon, malarion, anusprolapson k.a. Kune kun aliaj medikamentoj ĝi povas kuraci skabion, brogvundon, ftizon k.a. Cetere ĝi povas servi kiel bona asepsilo en kirurgio. Kun la disvolviĝo de industrio, gajloj estas uzataj pli kaj pli vaste kaj fariĝis necesajo en industrioj de petrolo, kemio, metalurgio k.a. En nia lando, plejparto de la gajloj estas tradicie eksportita.



Bapto al Lupo

(Jugoslava fablo)

En iu vilaĝo oni decidis okazigi bapton al lupo, por ke ĝi ŝanĝu sian sovaĝecon kaj ne plu mortigu ŝafojn. La lupo nevole faris promeson ne plu manĝi ŝafon kaj garantiis tion per sia honoro.

La invitita pastro komencis preĝi. Subite la lupo eksaltis kaj atente aŭskultis akriĝante siajn orelojn. La pastro rigidiĝis kaj demandis, kion ĝi volas.

La lupo respondis: "Mi ja aŭdis, ke ie ŝafo blekas."

Du enigmoj pri objektoj

Neniu kamp' sur ĝiaj ebenaĵoj
ne pinĉ' da ter' sur ĝiaj altaj montoj
ne gut' da akv' en la riveroj,
maroj —
vidiĝas sur ĝi nia tuta mondo.

* * * * *

Rondaj kaj brilaj
en par' rezidas,
orele pendas,
sur nazo sidas.

(La solvoj publikiĝos
en la sekvanta numero)

* * * * *



LA UNUAPERIODA KONS- TRUADO DE LA PANGIHUA-A FERA-ŜTALA KOMPANIO ESTAS PLENUMITA

Kaj ĝiaj instalaĵoj por produktado de minekspluato ĝis laminatado jam komencis funkcii. En la pasinta jaro, tiu kompanio superplenumis la taskon difinitan en la ŝtata plano. Jam komenciĝis ĝia duperioda konstruado.

Tiu granda ŝtala kombinato troviĝas en alta montaro sur bordo de Ginŝa-rivero en Siĉuan-provinco de Ĉinio. Tie estas granda riĉfonto de kunekzista minaĵo de vanado, titano, fero, kobalto, nikelo, kromo kaj galio, kaj konstruiĝis nova industria urbo Dukoŭ, kun la ŝtala kombinato kiel la ĉefa parto. En tiu urbo kun areo de centoj da kvadrataj kilometroj, jam stariĝis entreprenoj de malpeza industrio, elektro, maŝinfarado, karbominejo, kemia industrio, konstruaj materialoj, transportado, ligno, manĝaĵoj, bezonaĵoj por edukado, kulturo kaj higieno, komercaj kaj aliaj servaj instalaĵoj, kaj krome ankaŭ agrikulturaj bazoj en la ĉirkaŭurbo.

Tiu kompanio estis ekkonstruata en 1965 laŭ ĉina projekto kaj ĉiuj ĝiaj ekipaĵoj estas faritaj kaj instalitaj de ĉinaj laboristoj kaj teknikistoj. Dum la konstruado, ĝi

ricevis helpon de pli ol 700 fabrikoj tra la tuta lando.

LA INTERNACIA KURSO PRI AKUPUNKTURO FINIĜIS

En decembro de 1978, finiĝis la Internacia Kurso pri Akupunkturo kune aranĝita de la ĉina Ministerio de Publika Sano, la organizo de Disvolva Programo de UNO kaj la Monda Sano-Organizo.

En tiu kurso studis 6 kuracistoj de la afrikaj landoj Kamerunio, Liberio, Somalio, Maŭricio kaj Zambio. La respondeculo de la Instituto de Ĉina Medicino donis diplomojn kaj donacojn al la kurcistoj.

EKFUNKCIAS MODERNAJ EKIPAĴOJ POR LAMINATADO DE ŜTALPLATOJ EN LA VUHANA FERA-ŜTALA KOMPANIO

Modernaj ekipaĵoj importitaj el Okcidenta Germanio kaj Japanio por kontinue faradi ŝtalingotojn, varme kaj malvarme laminati ŝtalplatojn kaj siliciajn ŝtalplatojn estas instalitaj kaj komencis produkti normajn produktaĵojn. Laŭ la projekto, la laminatiloj kun ruliloj 1.7 metrojn longaj povas produkti en ĉiu jaro 3 milionojn da tunoj da maldikaj ŝtalplatoj. La gigantaj maŝinoj kun alta teknika nivelo de la sepdekaj jaroj estas aŭtomataj.

EKKONSTRUO DE GRANDA ŜTALA KOMBINATO DE BAŬŜAN

La konstruado de granda ŝtala kombinato en Baŭŝan-gubernio de Ŝanhajo estis komencita en la lasta tagdeko de decembro, 1978. La tu-

ta konstruado estos plenumita en du periodoj. Kiam la kombinato estos tute konstruita en 1983, ĝi povos produkti 6,000,000 tunojn da fero kaj 6,000,000 tunojn da ŝtalo en ĉiu jaro.

La kompletoj da grandaj ekipaĵoj por ĝi estos importitaj el Japanio. La tuta produkta procedaro estos regata per komputeroj.

Tiu kombinato estas unu el la 120 grandaj objektoj konstruitaj de Ĉinio, dum la periodo de 1978 ĝis 1985.

GRANDA ALBUMO "MEMORE AL ĈEFMINISTRO ĜOŬ ENLAJ"

La nomita albumo estis eldonita lastatempe de la Eldonejo de Historiaj Objektoj. Vicprezidanto Je Gianĵing manskribis por ĝi la titolon.

Tiu albumo redaktita de la Ĉina Historia Muzeo enhavas pli ol 500 fotojn pri manuskriptoj, surskribajoj, gravaj historiaj dokumentoj kaj notoj kaj liaj revoluciaj aktivadoj. Ĝi fidele registris la senmortajn meritoplenajn farojn de Ĉefministro Ĝoŭ Enlaj.

REDAKTA KAJ ELDONA KOMITATO DE LA VERKOJ DE GUO MOJUO FONDIĜIS

La nomita komitato estas fondita en Pekino kaj vicprezidanto de la Ĉina Akademio de Sociologio Ĝoŭ Jang funkcias kiel ĝia estro.

Guo Mojuo faris gravajn kontribuojn en literaturo, arto, filozofio, historia scienco, arkeologio, studo pri ideografiaĵoj sur bronzaĵoj kaj ostoj kaj tradukado de marksismaj teoriaj verkoj kaj eksterlandaj progresaj literaturaj verkoj.

FOSILIOJ DE GIGANTA DINOSAŬRO TROVITAJ EN ĜEGIANG

La fosilioj kun totala pezo de 1,350 kilogramoj estas trovitaj de laborantoj de la Muzeo de Ĝegiång-provinco ĉe Ĉentangbian-brigado de Lihian-komunumo de Ĝiangŝan-gubernio kaj transportitaj al Hang-ĝou por ordigado kaj rekunigo.

La diametro de la spino de tiu dinosaŭro estas 32 centimetroj, ĝia plej granda ripo longas 170 centimetrojn kaj la femuralo de ĝia posta membro longas 145 centimetrojn kaj larĝas 45 centimetrojn. Post unuapaŝa esploro oni konstatis, ke ĝi estas saŭropoda dinosaŭro, kiu estas kvarpieda giganto prenanta vegetaĵojn kiel nutraĵojn. Ĝia kapo estas malgranda, ĝiaj kolo kaj vosto estas longaj. Ĝi estas amfibio vivanta en marĉoza loko. Ĝi vivadis en kretaceo, ĉ. 100,000,000 jarojn antaŭ nia tempo. Paleontologoj opinias, ke la fosilioj de tia giganta dinosaŭro estas unuafaĵe eltrovita sude de Jangzi-rivero.

TOMBEJO DE LI ŜIGEN PLIAPAŜE KONSTRUATA

Li Ŝigen estas fame konata antikva farmakologo de Ĉinio. En lia hejmloko Kiĉun-gubernio de Hubej-provinco, lia tombejo estas pliapaŝe konstruata, kaj la konstrua laboro estos finita en aprilo de la kuranta jaro.

Li Ŝigen vivis antaŭ pli ol 300 jaroj en Ming-dinastio. Li dediĉis sian tutan vivon al studado pri farmakologio kaj verkis tre gravan farmakologian libron "Ben Caŭ Gang Mu" per energia laborado dum dekoj da jaroj.

En 1955, la popola registaro de Kiĉun jam konstruis la tombejon kaj muzeon de Li Ŝigen.

PRESENTADO DE ĤORO DE JUGOSLAVAJ STUDENTOJ

De decembro de 1978 ĝis januaro de 1979, la ĥoro de jugoslavaj studentoj nomita laŭ la jugoslava popola heroo Ivan Goran Kovaciĉ faris trisemajnan turneon en Ĉinio.

La ĥoro faris prezentadon en Pekino, Ŝanhajo kaj Kantono. Ĝi prezentis al la ĉina popolo la belan nacian muzikon de Jugoslavio kaj ricevis varmajn laŭdojn.

ELDONIĜIS ĈINA TRADUKO DE "FORMIĜO DE UNUECA NACIA ŜTATO DE RUMANIO"

Ĉina traduko de la libro "Formiĝo de Unueca Nacia Ŝtato de Rumanio", verkita de Prof. Constantin, C. Giurescu, membro de la Rumana Akademio de Sciencoj, estas eldonita de la Popola Eldonejo. Tiu libro helpas al la ĉinaj legantoj en pliapaŝa kono pri la batala historio de la heroo rumana popolo kaj plifortigos la amikecon inter la ĉina kaj rumana popoloj.

EKSPOZICIO PRI PETROLAJ, NATURGASAJ KAJ PETROL- KEMIAJ TEKNIKOJ DE FRANCIO

De novembro ĝis decembro de 1978, en Pekino okazis tiu ekspozicio. Montriĝis en ĝi ekipaĵoj kaj mezuriloj de pli ol 60 francaj fabrikoj por prospektado, ekspluatado, transportado, tenado kaj rafinado de petrolo kaj natura gaso, kaj krome ankaŭ bildoj kaj modeloj pri tiuflankaj avangardaj teknologioj. La ekspozicio okupis areon de 7,000 kvadrataj metroj. Dum la ekspozicio, ĉinaj kaj francaj teknikistoj faris interparolojn kaj interŝanĝis teknikojn kaj spertojn en vasta amplekso. Kaj la francaj amikoj an-

kaŭ faris komercajn interparolojn kun koncernaj ĉinaj kompanioj kaj kunvenis kun koncernaj industriaj kaj teknikaj branĉoj.

KUNLABORO DE ĈINAJ KAJ FRANCAJ MUZIKISTOJ

En decembro de 1978, fama franca direktisto Serge Baudo donis, en kunlaboro kun la ĉina Centra Filharmonio, simfonian koncerton, en kiu oni ludis verkojn de C. Debussy, F. Schubert kaj Betoveno. La direktado de S. Baudo karakteriziĝas per entuziasmo, personeco kaj forta efekto. Li estas lerta en harmonia kunago kun orkestro, dank' al kio la prezentado fluis kiel rivero de kantoj.

FRATINAJ UNIVERSITATOJ

En lasta oktobro, la Ŝanhaja Giaŭtong-universitato kaj la Universitato de Miĉigano interkonsentis fariĝi fratinaj universitatoj. En la periodo de 1979 ĝis 1982, la du universitatoj interŝanĝos instruistojn kaj sciencajn materialojn kaj invitos reciproke instruistojn al mallongaj sciencaj kunvenoj.

Krome, Giaŭtong-universitato fariĝis ankaŭ fratina universitato de la Universitato de Kalifornio en Berkeley, la Kalifornia Ŝtata Universitato en San Diego kaj la Universitato de Vaŝingtono en St. Louis.

JAPANA-ĈINA SOCIETO POR EDUKA INTERFLUO

En la 11-a de decembro, en Osaka de Kansai fondiĝis la Japana-Ĉina Societo por Eduka Interfluo. En la pasinteco, Kansai ĉiam estis centro por ekonomia interfluo kun Ĉinio. Japanaj amikoj esprimis, ke

ili klopodos tutforte por akceli edukon interfluon inter Japanio kaj Ĉinio, kaj kunlaboros laŭeble por la ĉina modernigo de sciencoj kaj teknikoj. Ili esprimis volon fari kontribuon en disvolvo de la longdaŭra amikeco inter la du popoloj de generacio al generacio per la interfluo.

EKSPozICIO DE SIEMENS-KOMPANIO DE OKCIDENTA GERMANIO EN ŜANHAJO

En decembro de 1978, Siemens-Kompanio de la Germana Federacia Respubliko okazigis ekspozicion pri elektronikaj kaj elektraj teknikoj en Ŝanhajo.

Frue en 1953, Siemens-Kompanio jam komencis komercadon kun Ĉinio kaj havas bonan negocan rilaton kun nia lando. La ekspozicio donis al la vizitantoj tre profundan impreson per la avangardaj teknikoj de siaj produktaĵoj. Teknikistoj de Ĉinio kaj Germanio faris pli ol cent interparolojn pri teknikoj de 31 objektoj. Tiuj aktivadoj akcelis interfluon kaj kunlaboron pri sciencoj kaj teknikoj.

ĈINIO DONACIS PANDOJN AL HISPANIO

Je la fino de la pasinta jaro, la ĉinaj pandoj Ŝaŭsaŭ kaj Kiangkiang ekveturis al Hispanio. Ili

estas donacitaj de la ĉina registaro al la reĝo kaj popolo de Hispanio.

La ina pando Ŝaŭsaŭ estas trijara. Ŝi estas naskita sub bredado en la Pekina Zoologia Ĝardeno. Ŝi estas aminda pro sia moviĝemo. La vira Kiangkiang, je du jaroj pli aĝa ol Ŝaŭsaŭ, estas altstatura kaj kvietema kaj ofte ridigas la rigardantojn per sia serioza sinteno.

Nun ĉinaj pandoj troviĝas ankaŭ en Koreio, Japanio, Britio, Francio, Meksikio kaj Usono.



Korespondi Deziras

* Tarozzi Vittorio, 45-j. masonlaboristo, kun gelaboristoj ĉinaj, rumantaj, bulgaraj. Adr.: Via Viterbo No. 20, 41000 Vaciglio, Modena, Italio.

* Gelernantoj (junuloj k plenkreskuloj) de Esp. kurso, kun ĉinaj esp-istoj aŭ, se eble, per komuna kor. kun simila ĉina grupo. Adr.:

S-ro Bourgeat Jean Claude, Saint Puy, F-32310 Valence/Baise, Francio.

* S-ro David Curtis, 51-j., kun ĉinaj geesp-istoj. Adr.: 7 St. Jude's Terrace, Weston-super-Mare, Avon, BS22 8HB, Anglio.

* Hispana esp-isto Felix Martin Triep, Doctor Alcay, 12, 3°C, Zaragoza-6, Hispanio, kun geesp-istoj

ĉinaj k aliaj landoj, k interŝ. pk k pm. Respondos ĉiujn.

* Sergio Lastra, 21-j. abituriento, Apartado Aereo 2254, Bogota D.E., Colombio, Suda Ameriko. Dez. kor. k interŝ. pm, bk, ktp.

* Helena Baranska, 55-j., kun ĉina aŭ japana amikino por interŝ. leterojn k pm. Adr.: Ul. Wodna 10/5, 57.300 Kladsko, Pollando.

BENOPETA OFERO

(Bildrakonto)

La bildrakonto estas adaptita laŭ la novelo «Benopeta Ofero» verkita de Lusin. Ĝi prezentas la tragikan travivaĵon de Bofratino Hianglin, ordinara vilaĝanino. La tragedio forte atakas la reakcian hommanĝan esencon de feŭdismo de la malnova Ĉinio.

57 bildoj

26 × 18.2 cm.

Prezo: RMB¥2.00 £0.60 US\$1.20 FF5.60 DM2.60 A\$1.05

Eldonis: Fremdlingva Eldonejo, Pekino, Ĉinio

Ĝenerala Distribuanto: GUOZI SHUDIAN (Centro de Ĉinaj Eldonaĵoj), P.O. Kesto 313, Pekino, Ĉinio




Sportaj floroj



Aerbana gimnastiko



Halterado



Grundgimnastiko



Stafetkurado kun tablotenisa pilko



Nagado



En ludo de piedpilko



nastiko kun ŝeĝero



Cina antikva balarto

Lernado de barrierkuro



**FOTOJ PRI NATURAJ
BELAĴOJ FARITAJ DE
ESPERANTISTOJ**



La vojo de rivereto Rosandra en valo apud Trieste de **Alessandro Rupini, Italio**

Parto de la urbo Trieste

de **Giuseppe Valle de Italio**



Perlamotaj Mozaikoj


Fotoj de Gang Zisuo

Perlamotaj mozaikoj estas speco de delikata metiar-tajo el zorge kungluitaj gravuritaj perlamotaj pecoj. Por formi belegajn figurojn en versimilaj koloroj oni devas elekti taŭgajn perlamotajn pecojn kaj zorge ilin prilabori, por ke la mozaikoj estu brilaj, delikataj kaj plaĉaj.



Salikokoj

Tropikaj fiŝoj



春 汛



Kankroj

湖石潭映錦



Lotusfloroj

鵲鴿秋色



Peonioj

Koko kaj Anaso

de Gang Geng



Koko kaj anaso promenas sur rivera bordo. Fanfaroninte pri sia beleco, la koko diras al la anaso: "Rigardu, kiel malbelaj estas viaj piedoj, per kiuj vi iracas balanciĝante."



2. La anaso diras: "Kun paro da belajflugiloj vi certe povas flugi alte kaj malproksime." La koko diras fiere: "Kompreneble. Ĉu vi ne kredas? Mi povas tuj transflugi la riveron." Tion dirinte li ekfrapas siajnflugilojn kaj leviĝas de la tero.



Apenaŭ atinginte la rivermezon, la koko jam foruzisian tutan forton kaj "plaŭ!" falis en la riveron. Kiam la koko povanta nek naĝi, nek flugi, krias por helpo, la anaso haste naĝis al li por lin helpi.



4. Sur la bordo la anaso forviŝas la akvon sur la plumoj de la koko, dirante: "Per tiu ĉi paro da malbelaj piedoj mi elsavis vin." Tiam pli ruĝiĝis la vangoj de la koko.

